

ESPERANTO

DECEMBRO 1963

56 a Jaro - N-ro 697 (12)



15 decembro:
libro-tago

STAFETO

La lastaj ses volumoj aperintaj sub ĉi tiu marko donas sume *mil kvincent paĝojn*:

- 1** MARJORIE BOULTON : **ZAMENHOF, AŬTORO DE ESPERANTO**
La plej kompleta, ĝisdatigita biografio de la iniciatinto de nia lingvo.
294 (268 teksto- plus 26 bildo-) paĝoj
Tolbind. 3.80; broŝ. 3.00
- 2** RAYMOND SCHWARTZ : **KIEL AKVO DE L' RIVERO**
488 paĝoj, kiuj konstrue kaj lingvomaturece konsistigas *la* vere unuan grandan romanon de nia originala literaturo.
Tolbind. 3.80; broŝ. 3.00
- 3** EDMOND PRIVAT : **AVENTUROJ DE PIONIRO**
Sur 162 (144 teksto- plus 18 bildo-) paĝoj aperas la 50-jaraj spertoj kaj ĉeftravivaĵoj de unu el niaj grandaj pioniroj .
Broŝurita: 1.80
- 4** G. E. MAURA : **DUONVOĈE**
En 180 paĝoj sin verve manifestas la artfilozofio, la vivresumo de granda poeto, ĝismedole ligita al la eventoj (kaj postkulisaĵoj !) de la Movado
Broŝurita: 1.50
- 5** JEAN RIBILLARD : **VIVO KAJ OPINIOJ DE MAJSTRO M'SAUD**
Filozofema azeneto donas al ni la dekantaĵojn de siaj meditadoj en unike artismaj prozaj memorĉapitroj. 134 paĝoj
Broŝurita: 1.50
- 6** STELLAN ENGHOLM : **HOMOJ SUR LA TERO**
La mejloŝtona generaciromano originale verkita komence de nia tria jardeko, aparte reviziita de la aŭtoro por ĉi tiu 2 a eldono, estas pliriĉigita de eseo de D-ro F. Szilágyi pri la vivo, verko kaj signifo de Engholm. 242 paĝoj
Tolbind. 2.80; broŝ. 2.00

(Prezoj indikitaj en usonaj dolaroj)

La librojn liveras la eld. **J. RÉGULO**, UEA kaj ĉiuj libroservoj de la Movado

KUNHELPU PLUPORTI LA TORĈON !

ŜIPESTRO RAKONTAS

originala verko de kapitano
F. T. Lundquist

Streĉaj rakontoj pri vivo kiel jun-maristo sur grandaj velŝipoj, kiuj veturas sur malproksimaj marvojoj ĉirkaŭ fremdaj kontinentoj kaj pri travivaĵoj kiel kapitano sur vaporŝipo dum la mondmilitoj.

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

72 paĝoj. Prezo: broŝ. gld. 3.75, bind. gld. 6.—.

Mendu ĉe U.E.A. aŭ via kutima libro-servo.

VI REVAS PRI FERIOJ, ESPERANTISTAJ KAJ TURISTAJ ?

J e n,

En regiono delonge kantita de la poetoj.

La Esperantista Kulturdomo

Kastelo de Grésillon

BAUGÉ (M. & L.) Francujo

Al vi malfermita, dum 1964

de la 26/3 ĝis la 8/4, okaze de **PASKO** Somere, en periodoj sufiĉe diversaj por ke ĉiu trovu kion li deziras trovi:

2/7—19/7: **INTERNACIAJ, KULTURAJ KAJ TURISMAJ FERIOJ**, ĉiam sukcesaj, kun prelegoj, ekskursoj, gajaj vesperoj.

19/7—9/8: Preparado por tri diversgradaj ekzamenoj.

9/8—30/8: Kulturaj esperantaj semajnoj
E. Kursoj — Bindado — Korbofarado, kantoj, dancoj, ludoj.

30/8—13/9: Esperanto-kursoj organizataj de U.F.E.


Je la fino de ĉiu periodo, okazos ekzamen-sesioj. **Dum ĉiu periodo: gvidataj ekskursoj al diversaj vidindaĵoj; ĉefa al Loire-Kasteloj kaj al mirinda nokta spektaklo en LE LUDE.** Ripozo, (kursoj ne estas devigitaj)

Skribu sufiĉe frue al ĉi supra adreso.

Grupoj povas esti akceptitaj, laŭ ebleco de la kulturdomo, ekster la organizataj periodoj.

La lasta manuskripto de

D-ro L. L. Zamenhof



FABELOJ

(kvara volumo)

de **H. C. Andersen**

tradukis: *D-ro L. L. Zamenhof*

244 paĝoj — 53 originalaj ilustraĵoj de
A. Uniechowski

Prezo: 3 \$ aŭ egalvaloro
(plus 10% por sendkostoj)

ELDONIS: HEROLDO DE ESPERANTO
(BRUSELO)

MENDU ĈE VIA LIBRO-SERVO AŬ ĈE UEA

esperanto

REVUO INTERNACIA

DECEMBRO 1963

5 6 a J A R O

N-RO 697 (12)

Fondinto: H. Hodler

Redaktoro: D-ro V. Sadler

Ĉion por redakto oni sendu al la Centra Oficejo.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando, Telefono: (010) 3 27 88. Ĝirkonto 378964.

TELEGRAMADRESO: ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A.:

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

LASTA SCIIGO

KONDOLENCO DE UEA AL LA USONA ESPERANTISTARO

Kiel fulmo el serena ĉielo la mondon trafis la ŝoka sciigo, ke pafilo de krimulo ĉesigis la vivon de John F. Kennedy, Prezidento de Usono, unu el la plej gravaj ŝtatestroj de la moderna epoko. Per kablogramo de la 23-a de novembro la Ĝenerala Sekretario de UEA esprimis al la Usona esperantistaro profundan kondolencon de la Asocio pro la forpaso de Prezidento Kennedy en tiel tragikaj cirkonstancoj. Al tiu kondolenco aliĝas ankaŭ la Redakcio, la Centra Oficejo kaj sendube ĉiu unuopa esperantisto.

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v., Nieuwe Binnenweg 460-462, Rotterdam-6, Tel. (010) 5 66 45

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesitaj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaron al nia redakcio.

Jara abono (1964): 15,— gld. (kun membreco kaj jarlibro 20,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj: ricevebla laŭ peto.

Anoncetoj pri korespondado:

0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

FRONTPAĜA BILDO:

Meksika knabino leganta (foto: UNATIONS). Tradicie, la 15-a de decembro estas la Tago de la Esperanta Libro (vidu p. 209).

Enhavo

La internacilingva literaturo en 1963 (Sadler)	201
La necesa Esperanta kulturo (Albault)	202
La internacia komerco bezonas la Internacian Lingvon (Carlén)	203
La parolproblemo de Azio	204
Sukcese finiĝis la Karavano de Amikeco (Sekelj)	206
"Ekstazo" (Sekelj)	208
"Afriko" (Brantzeg/Fridén)	208
Okaze de la Libro-Tago	209
Foto (Kubica)	210
Tri poemoj (Holub/Felix)	211
Nova Redaktoro Monda Kulturo	222
Rubrikoj	
Novaj libroj	212
Ricevitaj eldonaĵoj	214
Tra la mondo	215
Laŭfake	215
Ŝaka rubriko	215
Radio	216
49-a UK Hago	216, 222
50-a UK Tokio	216, 222
La Juna Vivo	217
Memoriga kalendaro	218
Esperantista Vivo kaj Nekrologo	218
Ni citas	218
Oficiala informilo	218
Internaciaj Konkursoj 1963	220

Manuskriptoj por "Esperanto" estu liveritaj al la redakcio en du ekzempleroj. Ili devas esti klare tajpitaj en korekta Esperanto. Oni skribu sur nur unu flanko de la papero (prefere en normformato A4), kun interlinia spaco kaj kun tre larĝa margeno maldekstre por redakciaj instrukcioj al la presisto. Supersignitaj literoj devas havi la ĝustajn supersignojn, se necese permane aldonitajn. Neuzotajn manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ afranko aŭ respondkupono.

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

esperanto, decembro 1963

La internacilingva literaturo en 1963

La nun finiĝanta jaro portis al la redaktoroj, librosservoj kaj legantoj valoran rikolton da novaj eldonaĵoj, inter kiuj klare elstaras la *Noveloj* de Lusin, la *Naŭzo* de Sartre, la originala romano *Kiel akvo de l' rivero* de Schwartz, kaj kompreneble la *Dia Komedio* de Dante. En la pasintaj kvin ses jaroj la eldonistoj liveris al ni (lasante flanken la novajn lernolibrojn, vortarojn, terminarojn, jarlibrojn, k.s.) meze ĉirkaŭ kvardek librojn jare, kun suma jaramplekso de ĉ. 4500 paĝoj. La nuna jaro jam facile superis tiun ciferon. Bone; sed ni ne fordonu nin al tro facilanima memkontento.

Estas vere, ke sur la kampo de literaturo nia laboro havas iom alian sencon, ol sur iuj aliaj kampoj. Tio estas diri, ke la eldonaĵoj en la Internacia Lingvo prezentas netan aldonon al Esperanta kulturo, kontraste kun ekzemple radioelsendoj, kiuj havas pli efemeran valoron. Sur la kampo de radio necesas strebi ĉiam al tio, ke la ofteco de la dissendoj ne malkresku, sed nia jam kreita literaturo de pluraj miloj da libroj ne malaperus, se ial ne aperus novaj libroj. Tiel ni povas ankoraŭ montri kun fiero al la Kaloĉaja traduko de la "Tragedio de l' Homo", kvankam ne multe utilas paroli pri la radioelsendoj de la sama jaro (1924), malgraŭ ilia tiama valoro. Sed ĉu sufiĉas aldoni ĉiujare kvardekon da novaj verkoj al la literaturo de Esperanto? Certe ne sufiĉas. Ni ja vivas en mondo, kiun karakterizas pli ol ĉio alia la fenomeno de rapida kresko. Kiel montris la artikolo de Inĝ. Aisberg en nia novembra eldono, la nacilingva scienca literaturo ne nur ĉiam kreskas, sed tiu kresko ĉiam pli akceliĝas. Kaj ne temas nur pri literaturo scienca, sed ĉiujare aperas en la mondo pli da libroj de ĉiuj specoj, responde al la kresko de la homaro kaj al la pliboniĝo de la presteknikoj. En tiaj cirkonstancoj ni ne rajtas kontentiĝi, konservante la ĝisnunan ritmon de la Esperanta eldonado, sed ni devas atendi, ke en 1963 ni kompreneble superu la atingojn de 1962, kaj ni devas celi, ke en 1964 evidentiĝu ankoraŭ pli granda progreso.

Al kiuj tamen devus direktiĝi ĉi tiuj rekomendoj? Ĉu al la konataj Esperanto-eldonejoj: Stafeto, Heroldo, KoKo, aŭ aliaj? Apenaŭ: ili ĉiuj jam plenumas ĉion, kion la ekonomio permesas — kaj foje eĉ pli. Sed ne estas same evidente, ke ĉio ebla estas jam farata en aliaj direktoj.

Ni konsideru unue la alian plej gravan fonton de eldonaĵoj en la Internacia Lingvo: la eldonejoj kaj instancoj, kiuj ordinare publikigas nur en naciaj lingvoj. La ĝisnunaj sufiĉe multaj spertoj tiurilataj montris, ke estus tro optimisme esperi, ke tiaj entreprenoj dediĉos sin kun

fervoro al la Internacia Lingvo dum epoko, kiam ankoraŭ tiu lingvo ne povas doni la rapidajn reenspezojn, kiujn ili kutimas atendi ke siaj investoj. Aliflanke, pluraj en la lastaj jaroj estis pretaj almenaŭ unufoje kaj kvazaŭ eksperimente ion eldoni ankaŭ en Esperanto. Ekzemploj estas la angla firmao Daily Mail (du libroj por infanoj), la nederlanda eldonejo Bruna (*Infanoj ne konas limojn*), la pola Polonia (*La Faraono*, *Quo Vadis*, *Sinjoro Tadeo*, k.a.), kaj la Fremdlingvaj Eldonejoj en Bulgarujo, Ĉinujo kaj Vjetnamio. Tute certe estus eble plilongigi tiun liston, se esperantistoj per personaj kontaktoj kaj kun konkretaj proponoj turnus sin al aliaj similaj entreprenoj. En ĉiuj tiaj okazoj nepre utilas apogi la proponojn sur la jam atingitaj sukcesoj ĉe la ĵus nomitaj eldonejoj. Tre taŭge la proponoj povas esti ligitaj al ekzemple datrevenoj de naciaj verkistoj: laŭ la listo eldonita de UNESKO, en 1964 revenas la naskiĝdatoj de i.a. Jens Baggesen (Danlando), Gabriele D'Annunzio (Italujo), M.Y. Lermontov (Sovetunio) kaj William Shakespeare (Britujo). Konvenaj proponoj al la ĝustaj instancoj povus rezultigi Esperantajn eldonojn de iliaj verkoj.

Se ili aperas en landoj kun devizaj malfacilaĵoj, tiaj eldonoj de neesperantistaj instancoj povas havi duoblan valoron, ĉar ili samtempe pliriĉigas per si mem la literaturon kaj plivigliĝas la librokomercon, permesante al esperantistoj de la koncerna lando aĉeti per interŝanĝo. Bedaŭrinde tamen, en kelkaj kazoj tiu valoro nur parte realiĝis, ĉar la Esperanto-asocioj de la eldonintaj landoj ne faris al si la penon diskonigi en eksterlando la novajn librojn.

Per tiu konstato ni jam tuŝas la alian plej gravan kampon, sur kiu ankoraŭ ne estas atingita ĉio atingebla: la disvendado. Pri la diskonigo de novaj eldonaĵoj ni povas, kun kelkaj esceptoj, esti sufiĉe kontentaj. Alie estas, bedaŭrinde, pri jam ne novaj libroj, kiuj riskas resti post nelonga konateco kiel nur misteraj titoloj en longaj listoj de neaĉetataj verkoj. Tiun mankon provos forigi la nova librolisto de UEA, en la Jarlibro 1964-a, kiu per pli granda amplekso kaj tute reviziita aranĝo helpas orientumi precipe novajn legantojn en la milo da libroj nun aĉeteblaj. Nia espero estas tio, ke tiu nova listo altiros al si la atenton ne nur de la individuaj aĉetantoj, sed de lokaj grupoj, kiuj pripensas la starigon de propra libro-servo aŭ de kluba biblioteko, de publikaj bibliotekoj, al kiuj oni atentigos ekzemple pri la ebleco mendi aron da tradukoj el malmulte konataj literaturoj, kaj de ĉiuj, de kiuj dependas la estonteco de la Esperanta Libro.

V. Sadler

La necesa Esperanta kulturo

Antaŭ nelonge, aludante la nunan konatan lingvan situacion en la mondo, neesperantisto, pri kiu mi havas bonan motivon opinii, ke li estas bone informita, diris al mi: "La eventoj tiel rapide moviĝas, ke konstruaj kaj precizaj planoj estas bezonataj nun!"

Ŝajne li pravas! Mi ne volas diskuti pri tio. Sed ĉu ni estas pretaj? Ĉu ni estas pretaj agi tiel, ke la okazaĵoj moviĝu favore al ni? Precipe ĉu ni estas pretaj surprizi la ankoraŭ pli grandajn taskojn, kiuj tiam trafos nin?

Plurfoje leviĝis voĉoj, ke ni devus krei "kadrolernejojn", kiuj instruus estontajn organizantojn, kursestrojn, ktp... Sed la problemo estas unue trovi la kompetentulojn por tiaj lernejoj en sufiĉe granda nombro. Tamen la esenca problemo estas apuda: finfine organizanto povas instrui eĉ ekster la movado, sed li tre riskas esti malbona *esperantista* organizanto. Efektive, krom lia faka kono de organizanto, nepre necesas, ke li posedu esperantistan klerecon, esperantan kulturon. Ju pli li atingos altan rangon en la esperantista organizo, des pli necesos, ke lia esperanta kulturo, krom la ĝenerala, estu vasta, profunda kaj ĉiuflanka.

Persono, kiu ne bone konas nian lingvon, ne havas almenaŭ ideon pri nia literaturo, ne aŭdis pri nia historio, nepre povos esti nur malbona organizanto en nia movado, aŭ nur malbona ambasadoro ekster ĝi, ĉar eĉ bonajn teknikojn li aplikos maltrafe, malkorekte, malkonvene.

Kontraŭe, se tiuj niaj sindonaj aktivuloj scias levi la propran esperantan klerecon, aŭtomate la tuta kultura nivelo de la movado leviĝas. Kaj tiam aŭtomate nia movado pli radias ekstere, altiras al si pli da novaj subtenantoj kaj adeptoj, pli proksimiĝas la tago de la ĝenerala enkonduko de nia lingvo, granda paŝo antaŭen por la monda interfratiĝo.

Kiel do atingi tiun personan pli altan klerecon, serve al nia movado? La respondo estas simpla: kiel en ĉiu sektoro, per la propra, per la persona laboro!

Bedaŭrinde ankoraŭ ne ekzistas por tiu celo specialaj kursoj en Fakultatoj, kiuj povus direkti la personan laboron kaj kiuj estus kronitaj de speciala licencio. Sed feliĉe ekzistas multaj libroj. Feliĉe ankaŭ, U.E.A. kreis superan Internacian Diplomon, kiun oni devas konsideri, kiel unikan instigilon, kiel internacian mezurilon, dank'al kiu en ĉiu lando ĉiu povu scii, kio estas konsiderinda, kiel la norma supera klereco. "Supera" en tiu senco, ke ĝi estu la minimumo, kiun devus atingi, post kelkaj jaroj, la plejmulto de niaj gvidantoj kaj precipe la novaj generacioj.

Jus en la Sofia Kongreso du kandidatoj el kvar sukcesis en la parola kaj skriba partoj. Nun post verkado de eta disertacio la Diploma povos esti aljuĝita al ili. Poste ili ja povos ankoraŭ perfektigi kaj siavice helpi en la levo de la nivelo en siaj respektivaj landoj kaj fakoj.

Bedaŭrinde leviĝis voĉoj ankaŭ en Sofio, laŭ kiuj la nivelo de la Diploma estus tro alta!! Ĉi tie ni devas nete kaj energie respondi: ne! Estus pli bone tute ne havi la Diplomon, ol malaltigi ĝin! Pli bone ĝin videble detrui, ol ĝin saboti! La argumento kontraŭ la Diploma estis la malgranda nombro da kandidatoj ĝis nun, kaj la ankoraŭ malpli granda nombro da sukcesoj. Sed bone komprenu, ke ne la Diploma kulpas! Kulpas la publika opinio, kiu ankoraŭ ne taksis la Diplomon laŭ ties celoj, kiel ĝi devus! Kulpas la multaj kompetentuloj, kiuj certe facile sukcesus en la ekzameno, sed kiuj ne volas peni iomete por ĝin trapasi! Ili ne komprenas, ke ilia propra sukceso en la ekzameno — preter ilia propra personeco, kiu eble, certe eĉ, ne bezonas plian diplomon — estas de tre granda intereso kaj graveco por nia kolektivo, por nia movado.

La nivelo de la ekzameno ja ne estas tro alta. Male, la nivelo de la kandidatoj ne estis sufiĉa. Al la ekzameno devus sin prezenti unuavice niaj kompetentaj gvidantoj de la meza generacio, kiuj bone konas ĉiujn materiojn de la programo, ĉar ili grandparte vivis ĝin aŭ jam abunde legis pri ĝiaj apartaj eroj. Trapasi la ekzamenon ne estos granda peno por ili, sed tiel ili helpos firme lanĉi la Diplomon kaj iom post iom, dank'al ilia impulso kreiĝos ĉiuj apartaj lerniloj kaj libroj, kiuj eble ankoraŭ parte mankas. Kaj tio siavice permesos ĉiam pli facile, trafe kaj profunde vastigi kaj asimiligi nian kulturon inter la novaj esperantistaj generacioj.

Konklude, ni diru, ke ĉiuj, kiuj sentas sin kapablaj, devus jam nun helpi al la kreado de la Internacia Diploma. Unuflanke ni devas atendi de la pli matura generacio, kie troviĝas i.a. niaj eminentaj verkistoj kaj pioniroj, Akademianoj, Membroj de I.E.K., ktp... helpon de supre, ekzemple per verkado de celkonformaj novaj libroj, studoj, ktp.... Aliflanke, de la meza generacio kaj ankoraŭ pli — precipe kun la paso de la jaroj — de la juna generacio, ni devas atendi stimulantan vetadon!! Nu! Kiu lando posedos plej da Diplomitoj, ni diru post dek jaroj? Kaj kiu landa sekcio de T.E.J.O. posedos la unuan Diplomiton inter siaj aktivaj membroj? La defia ganto estas ĵetita! Kiu ĝin levos?

D-ro Andreo ALBAULT

Estrarano de U.E.A. pri Kulturaj Aferoj.

La internacia komerco bezonas la Internacian Lingvon

Por progresigi Esperanton al fina venko estas nepre necese aktualigi ĝin en la plej diversaj homaj aktivecoj ekz. religio, scienco, kulturo, politiko kaj turismo. Sed ni laboru en medioj, kiuj havas internacian aspiron kaj bezonas internacian lingvon. Alie ni fiŝkaptas en la bankuvo.

La komerco kaj industrio estas kampo, kie ni malmulte laboris ĝis nun. Kaj tamen ĝi estas tre grava kaj vere internacia.

La komerco rompas ĉiajn barojn inter popoloj, eĉ politikajn, doganajn kaj valutajn. Ĝi celas egaligi mankon kaj abundon inter la landoj. Ĝi altigas la vivnivelon kaj de vendanto kaj de aĉetanto. La interŝanĝo de varoj per komerco estas la fundamento de nia materia kulturo kaj ĝi disvastigas ankaŭ spiritan kulturon.

Rigardate el tiaj vidpunktoj la internacia komerco havas idealisman flankon, kiu eĉ ŝajnas parenca al tiu de Esperanto, ĉar ambaŭ strebas rompi la barojn inter popoloj.

Kvankam la internacia komerco estas treege malnova — almenaŭ 3-4 mil jarojn — ĝi dum la lastaj 50 jaroj ege kreskis dank' al tekniko kaj la ebloj transporti varojn per vaporŝipoj, trajnoj, aŭtoj kaj aviadiloj. La moderna industrio, kiu provizas la komercon per varoj, ankaŭ kreskegis. Do, estas almenaŭ same dezirinde, ke nia lingvo progresu en la internacia komerco kiel en la arta kulturo kaj en la scienco. Kiam ni estos konkerintaj la komercon kaj industrion, ni jam estos venkintaj.

Ofte okazas konferencoj inter diverslingvanoj en la komerco kaj industrio. Tie oni ordinare ne havas lingvajn problemojn, ĉar tiujn konferencojn ofte partoprenas du ĝis dek personoj, kiuj konas la anglan, francan kaj germanan. Mi tamen partoprenis tian konferencon inter ĉ. 20 industriaj direktoroj, kaj oni bezonis du — tri interpretistojn kaj la ordinaran aranĝon de aŭdiloj.

La entreprenoj, kiuj vendas en aliaj landoj, devas eldoni literaturon pri siaj varoj. Ĝi povas esti varba, t.e. reklama, aŭ teknika. La teknika literaturo inkluzivas ankaŭ la plej simplajn uzindikojn aldonitajn kun la varoj.

Antaŭ du jaroj oni multe plendis en la fakgazetoj, ke la angla lingvo en la svedaj eksportbroŝuroj estas malbona. La teksto sendube estis skribita de svedoj, kiuj opiniis ke ili scias tiun lingvon sufiĉe bone por verki tekston. Sed la angloj tuj rimarkis ke ĝi estas fremda, t.e. ne-angla. En la korespondado tio ne tiom gravas

kiel en presita reklama broŝuro.

La moderna internacia komerco tamen devas havi reklambroŝurojn en la gepatra lingvo de la aĉetantoj. Do, la angla, germana kaj franca ne sufiĉas.

Kiel montrite tradukisto nur povas fari lingve perfektan tradukon en sian gepatran lingvon. Escepto el la regulo estas ĝenerale nur la facila, regula Esperanto. Tial Esperanto povas servi al la komerco kaj industrio kiel pontlingvo. Sed tio postulas reton de lertaj esperantistoj tra la tuta mondo, kiuj ne nur majstras Esperanton sed ankaŭ elegante povas uzi sian gepatran lingvon — do homoj kun lingvaj gusto kaj stilo. Rekompence ili povas ricevi pagon por sia laboro kaj farus grandegan utilon al Esperanto.

Ĉar nia lingvo estas logika kaj klara ĝi pli bone ol ekzemple la angla taŭgus por kontraktitoj inter neanglaj kaj neusonaj firmaoj. Persone mi havas malbonan sperton pri iu kontraktito en angla lingvo, kies sencon la du kontraktintoj en tre grava punkto perceptis malsegale pro lingvaj kaŭzoj. Sed Esperanto kiel komercjura lingvo apartenas ankoraŭ al la estonteco. Ni nur bone konsciu la superajn ecojn de nia lingvo en tiu rilato kompare kun la naciaj lingvoj internacie uzataj.

Antaŭ ne longe estis fondita "Instituto por Esperanto en Komerco kaj Industrio" kun sidejo en Nederlando. Ankoraŭ ni ne scias ĉu ĝi sukcesos aŭ ne. Estas tro frue paroli pri laboro antaŭ ĝia fariĝo. Sed kiam la instituto komencos sian agadon ĝi meritas ĉian apogon de la esperantistaro. Tial legu atente la komercajn anoncojn en la Esperantaj gazetoj. Kiam vi ion aĉetos, prefere elektu varojn de entreprenoj, kiuj per anoncoj subtenas nian aferon. Se iu entrepreno eldonas Esperantan reklambroŝuron, skribu petante ekzempleron. Farante tiel vi subtenas Esperanton.

Nia celo estas montri al la komerco kaj industrio kian utilon ĝi povas havi de Esperanto. Plene tio sukcesos nur kiam la esperantistaro estas tiel granda, ke ĝi kiel klientaro signifos ion por la komerco, t.e. kiam la Esperanta mondo estos interesa merkato. Sed ĝis tiam ni devas *vendi* Esperanton al la komercistoj. Ju pli racie ni laboras por Esperanto en ĉiuj aliaj medioj, religiaj, sciencaj, kulturaj kaj turismaj, des pli faciligas tiu vendado, kiu postulos energion, vendkapablon, tempon, monon kaj monon.

Erik Carlén



Inter la diversaj popoloj de la hinda sub-kontinento ekzistas multaj komunaj kulturaj elementoj, kvankam eble neniu el ili ampleksas ĉiujn hindajn popolojn. Unu el la plej vaste aprezeblaj kulturaj valoroj estas tiu de la danco, kaj precipe de ĝiaj klasikaj formoj, inter kiuj plej konata estas la skolo Bharata Natjam (Hinda Danco). La dancistino Santa Rao per sia majstreco pri Bharata Natjam kaj samtempe per speciala lerteco en la regionaj dancoj de Keralo atingis altan rangon inter dancistinoj de la nuna generacio. La interpopola komprenebleco de la hindaj dancoj baziĝas sur la hinduaj legendoj — plej ofte pri la dio Kriŝna — kiujn ili simbole rakontas, kaj kiujn bone konas la popolamasoj.

Malgraŭ tio ĵus dirita la diverseco de la lingvoj spite ĉiujn klopodojn registarajn restas grava malhelpo al interkontakto de hindaj popoloj. Kiam en la komenco de 1961 la Tuthinduja Radio en kunlaboro kun UNESKO dissendis specialan serion de edukaj televidaj programoj, ĝi elektis prezenti la programojn en la hinda lingvo, kiu tamen estas ĝenerale komprenata nur en difinita regiono ĉirkaŭ la koncerna radio-stacio. En la oficiala raporto de UNESKO oni skribas: "...la lingvan problemon, kiu kutime prezentiĝas en ligo kun la medioj de amaskomunikado en Hindujo, solvis tre malvasta atingo pro malalta povumo de la televida elsendilo". "Solvo" apenaŭ komentinda.

La elokventaj manoj de Santa Rao estas komprenataj ĉie en Hindujo. Kontraste, la Banko de Hindujo devas presi sur ĉiun monbileton surskribon en dek du lingvoj.

Inter la multaj problemoj, antaŭ kiuj staras hodiaŭ la emergantaj azianoj, troviĝas unu, kiun oni ofte forgesas: Kiun lingvon ili ĉiuj parolu? La dezirego por vere nacia kulturo postulas, ke la lingvon de antaŭaj koloniistaj mastroj anstataŭ senmanke indiĝena lingvo. Sed tuj leviĝas malfacilaĵoj.

Ekzistas novaj ŝtatoj, kies loĝantoj tutsimple ne havas komunan lingvon. En Malajujo, malsama dialekto de la malaja estas parolata en ĉiu kompasdirekto. La kortegeca lingvaĵo de l' sultanoj estas nekomprenebla por la slanguzantoj en la bazaro. Ĝentila alparolo en unu federacia ŝtato estas preskaŭinsulto en alia.

Tra 3,000 mejloj de la indonezia arĥipelago, de Sumatro ĝis Orienta Iriano, ankoraŭ multaj variantoj de la malaja estas parolataj, tiel ke eĉ en Djakarto oni parolas "la djakartan". En Filipinoj, inter ĥaoso da dialektoj, la tagaloga oficiale superas, la visajanan parolas la plimulto, la ilokana estas plej disvastigita.



La solvon oni trovas en komunigita lingvo. Sed tiun ĉi oni devas oficiale disvastigi kaj konscie lerni dum multaj jaroj antaŭ ol ĉiuj ĝin parolos. En urbo kiel Singaporo, malperfekta mandarenĉina estas la "lerneja lingvo" de tiuj, kiuj aĝas malpli ol tridek jarojn. Pli maljunaj lokaj ĉinoj ĝin tute ne konas. Provi trairi malurban Borneon pere de la nacia "bahasindonesia" similus trairi Teksason en Usono pere de la londona rimslango. En Manilo oni enkondukis la "filipinan" por pligrandigi la dignecon de l' nove-sendependa Filipina Respubliko, sed en la pasinta jaro la debatestro de la Malsupra ĉambro kaŭzis protestegon, kiam li dekretis, ke Akton prezentitan en la filipina oni devas reverki en la angla, por ke ĉiuj kongresanoj ĝin komprenu.

La teĥnika malriĉeco de la lokaj lingvoj signifas ankaŭ, ke oni devas multe ĉerpi el pli progresintaj lingvoj por ilia moderna vortprovizo.

Sed dum la malaja konstante prunteprenas el la angla, Indonezio en la pasinteco emis ĉerpi el la nederlanda, tiel ke, kvankam ambaŭ konsentis pri la celo evoluigi unu komunan lingvon, dum longa tempo ili pli kaj pli disiĝis. Krome, troviĝas ĉiam konservativeguloj, kiuj protestas, ke pure indiĝenan tradukon oni devas

trovi por ĉio, ekde televido ĝis cibernetiko, se necese laŭ la aglutina principo laŭ kiu la ĉina esprimo por "Mem-Veni-Fajro" signifas cigared-fajrilon.

La allogo de la angla kiel rimedo por internacia kompreniĝo en Azio estas jam preskaŭ nerezistebla. En ĉiu lando de la regiono ĝi ne nur estas instruata al plenplenaj klasoj en la lernejoj, sed sennombraj privataj instruistoj, kiuj mem ne kapablas malfermi la buŝon sen murdi la lingvon, tre abunde enspezas kontraktante transdoni siajn terurajn erarojn al aliaj kontraŭ pago.

Tamen, eĉ en la lernado de la angla, naciismo prenas sian lokon. Ĉe siaj lernejoj en Singaporo, la knaboj estas primokataj kiel eksteruloj, se ili ne sukcesas paroli la anglan laŭ la loka kimra-hinda kantaĉprononco kaj sindetenas aldoni tiajn frazojn, kia: "*I am telling you, man, lah!*" fine de ĉiu dua propozicio. Antaŭnelonge, anglalingva ĵurnalo aljuĝis premion al firma patrioto, kiu argumentis jene: "Kial paroli la anglan laŭ la angla maniero? Kiel sendependaj civitanoj de demokratia Malajujo, ni ne permesu, ke ni estu delogitaj mimiki la anglojn".

Tio estas eĉ pli ekstrema ol la komunista sinteno. Marŝalo Ĉen Ji, la ĉina Ministro pri Eksterlandaj Aferoj, urĝe rekomendis, ke studentoj ellernu fremdajn lingvojn por atingi la "trarompon", kiu ebligas, ke ili vere bone parolu ilin.

Sed, argumentas la ŝovinistoj, ekzistas la uson-angla, kaj io, kion oni povas nomi aŭstrali-angla, do kial ne ankaŭ aliaj? Kaj efektive, sableroj por la brikoj de ekskluzive angla Turo de Babelo flugas jam sur la vento. *Kid* sur la *sidewalk* en Seoul opinias, ke la korekta alparolo al nekonato estas *Hi Joe*, sed *anak* sur la *five-foot-way* en Singaporo estas konvinkita, ke ĝi estas *Good-bye*. Kaj tio estas nur la komenciĝo de konversacio en la angla. Kiom longa periodo de konfuziĝo devas forpasi, antaŭ ol la ĉinoj kaj japanoj, simple pro sia multnombro, restarigos unuecon, devigante al ni ĉiuj prononci ekzemple *roojn loe* kaj *loojn roe*?

Kiel ajn oni parolas ĝin, la universaleco de la angla kiel komuna esprimilo inter ĉiuj popoloj estas multe dezirata, kaj ĝi estas laŭdinde antaŭenigata de milionoj da entuziasmaj studentoj en Azio. Tamen oni timas pri la supo en la manoj de tiom da avidaj kuiristoj. Jam per antaŭsento de maltrankvilo mi rimarkas en la ĵurnalaro la nomon de akademio en Malajujo, kiu reklamas klasojn pri librotenado, kalkulado, ekonomio kaj kompreneble, la angla. Ĝi nomiĝas la "*Goon Institution*". (*Goon* estas usona malestima slangvorto, kiu signifas "indiĝenaĉo".)

(Laŭ "Observer" Fremdnovaĵa Servo trad. W. Auld)

Sukcese finiĝis la Karavano de Amikeco

Ni jam rakontis por niaj legantoj ("Esperanto" Nov. 1962) pri la KARAVANO DE AMIKECO tra Afriko, kiu sub la aŭspicioj de la Internacia Geografia Asocio ekveturis el Beogrado en marto 1962. Ĝiaj ok membroj el kvar landoj ŝarĝitaj sur du fortaj veturiloj kun kromveturiloj por la ŝarĝo, transiris post kelkaj landoj de Proksima Oriento Egiptujon, Sudanon, Etiopion, kaj Somalion. La legantoj de "Esperanto" forlasis la Karavanon tuj post ĝia eniro en tiun ĉi landon.

En Somalio ni pasigis pli ol unu monaton, plejparte vojaĝante tra vojoj polvaj kaj sablaj, faritaj de la radoj de veturiloj kaj de la piedoj de multnombraj kameloj. Nia apero aldonis al la somala pejzaĝo nur unu pluan al la multnombro da konstante migrantaj grupoj de nomadoj. Laŭ la plej fidindaj statistikoj 85% de la loĝantoj de Somalio estas nomadoj. Estante brutbredistoj, ili devas konstante sekvi la bezonojn de paŝtado de siaj brutoj, jen en la pli malsekajn altaĵojn, jen en la proksimecon de rivervojo kun putoj, jen en la savanojn, kie la pluvetoj aŭtunaj verdigas la foliaron de arboj kaj arbustoj.


Iliaj kabanoj estas faritaj el kelkaj matoj kaj pluraj kurbaj branĉoj, kies tasko estas retenigi la matojn sur ilia loko, kiam la vento de la savano ekblovas. La tuta hejmo de nomada familio konsistas el ĝuste tiom da aĵoj, kiom unu kamelo, azeno aŭ bovo povas kunporti surdorse.

Somala nomado rakontis al mi, ke verŝajne Mahometo pensis ĝuste pri ili kiam li permesis al viro havi kvar edzinojn. Nomado ja nepre bezonas ilin. La ĉefo de la familio kun kelkaj el siaj plej aĝaj filoj prizorgas la kamelaron. Unu el la edzinoj kun siaj infanoj kondukas la bovaron al la proksimeco de iu rivero. La dua edzino postiras la ŝafaron, la tria la kapraron. Fine la kvara devas prizorgi sian edzon, kaj kunvivi kun li. Kiam ŝi gravediĝas, ŝi transprenas la kaprojn, kaj rotacio ekestas. Ĉe ĉiu rerenkonto kun iu el la edzinoj, la edzo ekkonas ankaŭ sian plej junan infanon.

Mogadiŝo, la ĉefurbo de Somalio, estas interesa miksaĵo de araba, persa kaj eŭropa stilo. Tiel koncerne la konstruaĵojn kaj la vivmanieron, kaj ankaŭ la homajn tipojn, en kiuj miksiĝas ankaŭ sufiĉe da afrikaj karakteraj trajtoj. Ne mirinde. Jam du jarmilojn araboj, hindoj, persoj kaj indonezianoj vizitadas la orientan marbordon de Afriko per siaj velŝipoj, profitante la musonajn ventojn, kiuj aŭtune blovas sudokcidenten, kaj printempe nordorienten.

Tiel, dum jarcentoj la ventoj fidele transportadis la bravajn navigistojn kune kun iliaj ŝarĝoj de teksaĵoj kaj ferproduktaĵoj, kaj reportadis ilin hejmen kun afrika eburo, oro kaj sklavo.

Somalio havas historion senprecedencan por Afriko. En preskaŭ ĉiuj aliaj landoj de tiu kontinento ekzistas multaj triboj parolantaj tre diversajn lingvojn, kaj la kolonia mastro altrudante sian lingvon al administra unuo, unuigis la tribaron kaj donis al ĝi komunan lingvon. La somaloj, kontraŭe, estas unusola granda popolo, kun unueca lingvo. Ĝis 1960 ĝi estis dispecigita sub protekto brita kaj itala, en Franca Somalio, Etiopio kaj Kenjo. Tiel la nun kuniĝintaj iamaj brita kaj itala protektoratoj estas lingve disigitaj sur niveloj administra kaj kultura. Tio ĉi estas grava problemo de tiu lando.



Nova amikeco en Bagamojo, Tanganjiko, kiun la Karavano trapasis survoje al Daresalamo.

En la Universitata Instituto de Mogadiŝo mi faris prelegon pri Esperanto, kaj poste havis plurajn kunvenojn kun grupeto da interesitoj.

Kenjo estis nia proksima agadkampo. Lando kun agrabla klimato kaj prosperpromesa, kiu akiros sian sendependecon ĝuste kiam tiu ĉi artikolo aperos: la 8-an de decembro 1963.

Ĝia ĉefurbo Najrobio estas unu el la plej ĉarmaj kaj plej modernaj urboj ne nur de Afriko, sed de la mondo. Ĝia klimato estas ideala. Nek troa varmo, nek troa malvarmo. Ĝia alteco de 2.000 metroj super marnivelo mildigas la efikon de la proksimeco al la Ekvatoro.

Tie ni renkontis malnovan esperantiston, s-ron Leslie Martin. Helpe de li mi prelegis pri Esperanto kaj interesigis grupon pri nia afero, kvankam pro la mallongeco de la tempo ne estis eble fari ion pli konkretan. Kun pluraj altrangaj personoj el la registara kaj universitata medioj ni interparolis pri la lingva problemo. Tie la tereno montriĝis tre malfacila, ĉar ĉiuj rigardas al la angla kiel al kulturlingvo, kaj tiuj kiuj pensas pri liberiĝo de tiu "balasto", nur imagas la lingvon ŝuahilian kiel nacian lingvon. Tiu ĉi estas parolata ĉu kiel gepatra ĉu kiel dua lingvo en preskaŭ tuta Kenjo, Tanganjiko, Ugando kaj Zanzibaro. En Tanganjiko ĝi jam estas agnoskita kiel ŝtata lingvo, kaj oni jam aŭdas en ĝi diskutojn en la parlamento.

Ni renkontiĝis kun farmistoj eŭropaj kaj afrikaj, kaj kun membroj de la tribo Kikuju, el kiu antaŭ jardeko elkreskis la tiam famiĝinta movado Mau-mau.

La bestrezervejoj estas granda natura allogaĵo de Kenjo kaj Tanganjiko. Ĉiuspecaj afrikaj sovaĝbestoj libere vivas en pluraj rezervejoj, el kiuj kelkaj estas nur iomete malpli grandaj ol Nederlando. Laŭ la regulo en tiujn rezervejojn oni rajtas eniri per aŭtomobilo, post pago de enirbileto, sed oni ne rajtas eliri el la veturilo, nek pafi sur bestojn aŭ eksciti ilin.

En la savanoj de Tanganjiko ni konatiĝis kaj amikiĝis kun la tribo Masaj. Tiuj iamaj batalemuloj estas ribeluloj kontraŭ la penetro de la eŭropa civilizo. Ili strikte konservas siajn antikvajn morojn kaj vivmanieron. Ili loĝas en malgrandaj kabanoj el branĉoj kaj koto. La viroj kolorigas ruĝe siajn longajn plektitajn hararojn, dum la virinoj razas la kapon, kaj portas grandegajn orelornamojn. La viroj inter la 16-a kaj la 30-a jaraĝo apartenas al la militista klaso, sed ankaŭ en alia aĝo ili neniam estas videblaj sen lanco en mano. Ilia ĉefa nutraĵo estas acidlakto konservita per bovina urino, kaj okaze ili trinkas sangon ĉerpitan el la kola vejno de bovo. Ankaŭ grenon ili aĉetas de siaj najbaroj, kvankam ili profunde malestimas tiel terkulturistojn kiel ĉasistojn.

Ni alvenis ĝustatempe al Daresalamo por tie festi kune kun la tanganjikanoj la unuan datrevenon de la sendependeco de ilia lando, kaj ĝian proklamon por respubliko.

Mi havis okazon longe interparoli kun la nova prezidanto de Tanganjiko, d-ro Julius Njerere. Pri Esperanto li havas favoran opinion, rekonas ĝian bezonon, sed ne fidas ke en Afriko ĝi povus fari rapidan progreson.

Kun aliaj altranguloj kaj ordinaraj homoj mi havis longajn diskutojn, foje tre fruktodonajn, pri Esperanto. La plej grava ŝuahilia tagĵurnalo publikigis tutpaĝan artikolon favore al E., kaj post mia prelego en la Ŝuahili-Instituto mi ekgvidis kurson kun deko da lernantoj. Post mia forveturo la entuziasma direktoro de tiu instituto, s-ro Kajunjumele, daŭrigis la gvidadon de la kurso kaj fondis Esperanto-Societon de Daresalamo.

Daresalamo estis la plej suda punkto de ni atingita. De tie la membroj de la Karavano de Amikeco revojaĝis per diversaj vojoj.

Se mi pripensas la multajn malfacilaĵojn kiujn ni devis venki, kaj la oferojn kiujn nia vojaĝo kostis, mi devas demandi min ĉu la rezultoj estis proporciaj al ili. Kaj mi devas jese respondi.

Antaŭ ĉio ni akiris milojn da amikoj en ĉiuj homtavoloj.

Al multaj ni alportis kuraĝigan mesaĝon, ĉu en formo de novaj konoj, medikamentoj, ludoj kun infanoj, aŭ interparoloj tra kiuj vibris optimismo kaj fratecaj sentoj.

Ni sukcesis kolekti grandan kvanton de informa materialo, en formo de filmoj, fotoj, sonbendoj kaj skribaĵoj. Adekvate distribuitaj tiuj materialoj povas diskonigi multajn neglektitajn faktojn pri Afriko kaj la afrikanoj.

Por Esperanto nia laboro ne povas esti mezurata per la nombro de novaj esperantistoj aŭ societoj. La multaj centoj da distribuitaj broŝuroj pri la Internacia Lingvo, la multaj miloj da gazetoj sur kies paĝoj oni parolis pri Esperanto, kaj la multaj altranguloj kaj aliaj homoj al kiuj ni persone parolis pri ĝi, kiuj povis praktike vidi la funkciadon de nia lingvo inter la karavananoj, sendube restas kiel valora kontribuo al la ekkono de Esperanto sur tiu kontinento.

Kvankam Afriko estas la kontinento kie Esperanto povus esti utilega, preskaŭ sava ideo, la obstakloj por ĝia penetro estas grandegaj. Kiel plej granda mi menciui, ke ĉiuj altranguloj tenas siajn bonajn postenojn ne nur dank' al sia elstara inteligento, sed ankaŭ pro la bona kono de iu eŭropa lingvo, franca, angla, itala aŭ portugala. Estus malfacile postuli de ili rezigni pri tiu sia avantaĝo kaj egaligi sin al la aliaj komencantoj en la lernado de Esperanto.

Sed ni ne perdu la kuraĝon. La kontinento kuŝas tie atendante nin, kaj ni ataku ĝin ĉiuflanke.

Tibor Sekelj

Tibor

Sekelj :

„Ekstazo”



Nils

Brantzeg :

Dum la salto
longiĝas la gazelo
horizontale
alprenante la formon
de la fiŝo,
kiam je venta facile
ĝi fendas la altlandan oceanon
sub arda suno Afrika.

Blindotime kiel fiŝo
fuĝanta antaŭ la reto
ĝi flugas per sensonaj
zigzagaj saltoj
dum la herbo fermiĝas
post ĝi
rapide kiel kudro
de kudro-maŝino:
Kie ĝi estas — — ?

„Afriko”

Post ĉiu deka, oka,
kvina saltoj
ĝi faras saltegon,
tiel ke la buŝo levita
la kornoj
la panike klakantaj
klovoj
duone liberiĝas.

Sed por ĉiu salto
venas la vesperombro
pli proksimen,
venas la mallumo kun la
sangaj muzeloj,
venas la nokto — kaj la murdo
pli proksimen.

El la Norvega tradukis
Henry Fridén

Klovoj — (fendhufo), no., sv., da.,
angle (cloven foot), germ.

Nia ŝuldo al Zamenhof

Estas ĝojige konstati, ke la Internacia Lingvo povis vastiĝi al la tuta terglobo kaj tamen resti unueca: ne ĉiuj kulturlingvoj restas unuecaj; ekz-e la mondfama usona lingvisto Mario PEI agnoskis, ke la angla estas dividita al du kategorioj de dialektoj: la britaj kaj la usonaj, dum ankaŭ laŭ la sama aŭtoro la franca kaj la hispana restas tre unuecaj.

Kaj tiun unuecon de Esperanto ni ŝuldas al nia jam firma kaj solida tradicio, kiu apogas sin ne nur sur la Fundamento de Esperanto, sed ankaŭ sur la tuta verkaro de D-ro L. L. Zamenhof kaj kompreneble ankaŭ sur la verkoj de la multiĝantaj bonaj aŭtoroj.

Tiun unuecan tradicion kaj tradicion unuecon ni ja ŝuldas al la saĝa disciplinemo de niaj unuaj pioniroj kaj al la komprenemo de la granda plimulto de niaj verkistoj, kiel ankaŭ de la ĉefoj de nia movado, sed ni ŝuldas ĝin unuarange al Zamenhof mem, kiu kun saĝa intuicio kaj granda psikologio sciis inspiri kaj solidigi tiun kolektivajn sintenon. Al Zamenhof, kiu ne nur donis al ni la teoriajn bazojn de nia lingvo, sed ankaŭ praktikajn ekzemplojn: lia verkaro estas efektive kolosa, ĉu originala, ĉu traduka!

Tio estas faktoj, kiujn konvenas memorigi kaj pripensi, hodiaŭ, kelkajn tagojn antaŭ la 15-a de Decembro, datreveno de la naskiĝo de D-ro Zamenhof, tago jam delonge ĉiujare festata kiel la Tago de la Esperanta Libro. Des pli, ke ĉi-jare ni devas esti dankaj al diversaj eldonistoj, kiuj kvazaŭ en koncerto akordiĝis por doni al ni en freŝaj kaj modernaj vestoj sufiĉe multajn verkojn de la iniciatinto de Esperanto, aŭ neniam aperintan, aŭ jam de longe elĉerpitajn kaj ne plu troveblajn: Fabeloj de Andersen, Hamlet, Marta, Lingvaj Respondoj, Fundamenta Krestomatio, Fundamento, Proverbaro, ... Jen, plektmikse, kelkaj titoloj ĵus reapertintaj aŭ baldaŭ mendeblaj ĉe via libroservo; pri ili vi cetere konsultos la apudan liston.

Andreo Albault

Fundamento de Esperanto, Kvin-lingva Eldono (red. ALBAULT), 355 p., 21,5 × 15,5 cm, tuj aperonta. Prezo: bind. 12,50 gld. (50 st); broŝ. 9,50 gld. (38 st).

Franca Eldono, kun U.V., 1,20 gld. (4,8 st).

Greka Eldono, kun U.V., 1,60 gld. (6,4 st.)

Indonezia Eldono, kun U.V., 2,40 gld. (9,6 st.)

Itala Eldono, kun U.V., 1,60 gld. (6,4 st.)

Universala Vortaro, Armena Eldono (aparta volumo), 2,— gld. (8 st.)

Fundamenta Krestomatio, 16-a Eldono, 460 p., duontole bind. 8,50 gld. (34 st); broŝ. 7,— gld. (28 st.)

17-a Eldono, 446 p., tole bind. 11,25 gld. (45 st.)

Lingvaj Respondoj, 6-a Eldono prilaborita de Prof. WARINGHIEN, 130 p., tole bind. 7,50 gld. (30 st.), broŝ. 5,75 gld. (23 st.)

Zamenhof-Radikaro, kompilita de E. WÜSTER, kun precizaj lokindikoj por ĉiuj neoficialaj radikoj uzitaj de Zamenhof 84 p., 2,75 gld. (11 st.)

Originala Verkaro, kompilita de DIETTERLE. Antaŭparoloj, artikoloj, paroladoj, eseoj, leteroj kaj poemoj de Zamenhof, 604 p., bind. 12,75 gld. (51 st.)

Leteroj de Zamenhof, aranĝitaj kaj komentitaj de Prof. WARINGHIEN. Du volumoj, entute 740 p., binditaj, po 8,55 gld. (34,2 st.)

Pensoj de Zamenhof, kun paralelaj tekstoj Esperanta, angla, franca, germana kaj itala. 31 p., 0,60 gld. (2,4st.) Elektitaj citaĵoj.

Proverbaro Esperanta, 2-a Eldono aranĝita de ROGISTER, 167 p., 5,70 gld. (22,8 st.) Profunda fonto de sentencoj kaj parolturnoj.

Zamenhofa Legolibro, redaktita de KIDOSAKI. 106 p., 1,25 gld. (5 st.) Elektitaj eroj originalaj kaj tradukitaj.

Unua lernolibro laŭ Zamenhof, 71 p., 1,90 gld. (7,6 st.) Miksaĵo el la ekzercaro, proverbaro, k.s.

TRADUKOJ

La batalo de l' vivo, romano de Charles DICKENS; 3-a Eldono, 128 p., bind., 3,50 gld. (14 st.)

Fabeloj de Andersen; 3-a volumo, 153 p., 3,50 gld. (14 st.) 4-a volumo, 240 p., ilustrita, 11,50 gld. (46 st.)

Georgo Dandin, komedio de MOLIERE; el la franca; 3-a Eldono, 51 p., 2,10 gld. (8,40 st.)

Ifigenio en Taŭrido, versa dramo de GOETHE; el la germana; 3-a Eldono, 108 p., 3,50 gld. (14 st.)

La Rabistoj, tragedio de SCHILLER; el la germana; 2-a Eldono, 144 p., 3,50 gld. (14 st.)

La rabeno de Baĥaraĥ, novelo de HEINE, el la germana, en unu volumo kun **La gimnazio**, novelo de Šalom ALEJHEM, el la juda; 2-a Eldono, 67 p., 2,50 gld. (10 st.)


La Sankta Biblio, inkluzive la Zamenhofan tradukon de la Malnova Testamento, el la hebrea; bind. 6,50 gld. (26 st.); lede bind. 17,60 gld. (70,4 st.)

La revizoro, komedio de GOGOL; el la rusa; 2-a Eldono, 99 p., 3,50 gld. (15 st.)

El dramoj, scenoj el "Ifigenio" kaj "La rabistoj"; 2-a Eldono, 48 p., 0,25 gld. (1 st.)

El komedioj, scenoj el "Georgo Dandin" kaj "La revizoro"; 2-a Eldono, 48 p., 0,25 gld. (1 st.)

El la Biblio, elektaĵoj el la Psalmaro, la Sentencoj de Salomono kaj la Predikanto; 3-a Eldono, 48 p., 0,25 gld. (1 st.)



Fotografis: František Kubica

Knabino en laboratorio

La fingroj, infanterianoj de la scienco,
ŝovas
ĉelojn,
mikrobojn,
molekulojn
sur la nigroblanka ŝak-tabulo.

Sed la okuloj rigardas
ĉiam iom alien.

Kaj en ĉiu botelo da ksilolo
vidiĝas vizaĝo de la maro,
sur ĉiu paĝo de protokolo
dolĉa senkvieto de herbejoj,
en la centrifugilo
spiro de gajaj bovidetoj
en la celulozo tuŝmoleco de lipoj,
en mikroskopo steloj de la vespero,
en infinito premo de mano.

Kaj en ĉiu provtubeto
tute malgranda peceto da amo,
kiu estis,
kiu estas,
aŭ kiu estos.

Kapo

Ene estas kosma ŝipo
kaj projekto,
malestabli pianolecionojn.
Kaj estas tie
arkeo de Noa,
kiu estos la unua.
Kaj estas tie
tute nova birdo,
tute nova leporo,
tute nova burdeto.

Estas tie rivero,
fluanta supren.
Estas tie multiplika tabelo.
Estas tie malmaterio.

Kaj neniel ĝi estas kombebla.

Kranverŝejo

Ĝuodona alkoholo
malsuprenfluas laŭ la mukozoj
kvazaŭ hidrargo
supreniĝas en la vejnoj
ensuĉiĝas en la cerbon
ascendas el la nuko
kelke da ŝanceliĝantaj ĉeloj
grimpas en la fajenca kranio
Tio ja estis hodiaŭ gaja vespero.

MIROSLAV HOLUB

Ĉeĥa poeto, naskiĝinta la 13an de septembro 1923 en Pilzeno, do nun kvardekjara, profesie estas sciencisto-biologo. Li laboras en biologia esplorinstituto kaj samtempe gvidas la redakcion de la ĉefa ĉeĥa sciencopopulariga revuo VESMÍR (LA UNIVERSO).

Kial kantas la birdoj? — La biologio unusence respondas tiun ĉi demandon: ilia kanto esprimas sole ilian viran amon al ilia ino. Tuj kiam lia sopiro plenumiĝis, la virbirdo ĉesas kanti.

La homo ne plu estas tiel simpla kreaĵo. Liaj sentoj ne estas plu limigitaj je nura seksa amo, lia multegforma agado multobligis ankaŭ liajn sentojn, kaj lia plej homa — kaj sole homa — agado, scienca ekkonado de la mondo, fariĝis kvazaŭ lia dua natureco. Tamen la scienca laboro, kvankam plena de sopiroj neplenumitaj, surprizoj neatenditaj kaj eventoj skuantaj, ĝenerale tiel plenigas la vivon de scienculo, ke li tute ne emas kanti.

Nu, jen unu rara escepto. Holub, spite la tagtagan sciencan penlaboron, ne perdis sian sentemon kaj kantas. Li kantas ne nur pri sia scienco, sed ĉefe el ĝia vidpunkto. Eble iu leganto riproĉos al liaj poemoj, ke ili supozas multe da konoj. Al tiuj oni povas respondi eble per vortoj de alia ĉeĥa poeto, Otokar Březina: Ĉiu ĝuu la fruktojn de la arbo de l' arto el tiuj branĉoj, kiujn li ĝisatingas.

Ĝis nun aperintaj poemaroj:
1958 — TAGA DEĴORO; 1960 — AKILO KAJ TESTUDO; 1961 — ALFABETLIBRO; 1962 — IRU KAJ MALFERMU LA PORDON; 1963 — TUTE NESISTEMA ZOOLOGIO.

Tradukis kaj
prezentis
Eduard
Felix

Novaj Libroj

Cion ricevitan ni mencias. Verkojn por recenzo ni elektas inter la duope ricevitaĵoj. Neneŭtralajn eldonaĵojn ni senpartie resumas. *) ricevebla ĉe U.E.A.

LA OFICIALA BAZO DE NIA LINGVO

Fundamento de Esperanto, 9-a eldono. Eld. Esperantaj Francaj Eldonoj, Marmande, 1963. 355 p., 15,5 × 21,5 cm. Prezoi: bind. 12,50 gld (50 st), broŝ. 9,50 gld (38 st).^{*} Konsistas el fotopresaĵo de la 1-a eldono de 1905, enkonduka notico kaj lingvaj rimarkoj de D-ro Andreo ALBAULT, akademiaj korektoj de la Universala Vortaro, k.a. aldonaĵoj.

En la jaro 1905 la partoprenantoj de la Unua Universala Kongreso de Esperanto en Bulonjo akceptis kiel aŭtoritatajn por ĉiuj Esperantistoj tri primitivajn dokumentojn de Esperanto, nome la verkojn *Kvinlingva Gramatiko*, *Ekzercaro* kaj *Universala Vortaro*. Kun aldono de *Antaŭparolo* tiuj verkoj ricevis la titolon *Fundamento de Esperanto*, kaj restas la oficiala bazo de nia lingvo.

Ĉiujn tri verkojn karakterizas la fakto, ke ili uzas la lingvojn francan, anglan, germanan, rusan kaj polan kiel perajn lingvojn. Ekzistas, do, kurioza situacio. Nome, la aŭtoritata bazo de nia lingvo, kvankam deviga por ĉiuj, tamen estas rekte kaj plene konsultebla nur de tiuj, kiuj konas la kvin supre menciitajn lingvojn tiajn, kiaj ili estis en la fino de la 19-a jarcento; kaj dum la lastaj pluraj jaroj eĉ tiuj supozeble malmultaj kleruloj ne facile trovas ekzempleron de dokumento jam delonge elĉerpita, sed nun fine reeldonita. Tamen, ĝis aperos ia "Plena Komentario pri la Fundamento", eĉ la plej nelingvistaj personoj povas profiti el la studado de la Fundamento mem, ĉar la Esperantaj vortoj kaj frazoj troviĝantaj en ĝi estas nedisputeble korektaj kaj leĝdonaj, eĉ se kelkaj jam arkaikiĝis. Per ĉi tiu 9-a eldono tia studado plifaciliĝis dank' al la enkonduko, marginaj indikoj kaj aldonitaj sekcioj, kiuj servas diversmaniere al la ĝusta taksado de la Fundamento.

Estas apenaŭ kontraŭdireble, ke ĉiu Esperantisto devus posedi kaj studi la Fundamenton. Zamenhof

mem skribis en la Antaŭparolo, ke "la okuloj de ĉiuj esperantistoj estu ĉiam turnataj... al tiu ĉi libro", kaj ke "la 'Fundamento de Esperanto' devas troviĝi en la manoj de ĉiu bona esperantisto kiel konstanta *guida dokumento*,... kiel konstanta *kontrolilo*, kiu gardos lin de deflankiĝado de la vojo de unueco".

Tamen, iuj Esperantistoj povus trovi sin ĝenataj pro la praktika neeblo *rigore* obei la Fundamenton, precipe leksikologie. Pri tiu demando skribis D-ro Albault en sia enkonduko dirante, ke "neniu obeas, nek materiale povas obei la Fundamenton ĝis en ties leksikologiaj detaloj." Prave dirite; sed oni povus preferi, ke tiu konstato estu farita en tia maniero, ke la legantoj ne tro facile rezignu la provadon konformigi sian Esperanton al la Fundamento ĝis tia grado, kia ne tro katenas el praktika vidpunkto. Anstataŭ ŝajni sugestoj, ke konsciencie obei la Fundamenton signifus ĉiam uzi *signo de poŝto*, *pafilego*, k.c., en la senco *poŝtmarko*, *kanono*..., pli bone estus inviti la legantojn registri simplan konstaton pri la arkaikiĝo de tiuj kaj aliaj esprimoj, konstaton cetere jam antaŭviditan de Zamenhof en la Antaŭparolo.

Simile estas pri la manskriba alfabeto. D-ro Albault konstatas la ekziston de la problemoj de la internacieco de la manskribo; sed anstataŭ bedaŭri la tro ornamajn formojn de la manskribaj literoj reproduktitaj en la Fundamento, ĉu oni ne povus konsili al obeado de iliaj esencaj konturoj, t.e. sen ornamoj, krome modifante nur ĉe tro similaj paroj? La originalaj formoj restus fundamentaj, sed arkaikaj, kaj ĝis certa grado aŭtoritatigus la devenajn, kiuj baze ne tro malsimilus al ili.

D-ro Albault mem konstatas, ke restas fareda granda laboro leksikologia pro la neeblo, ke ĉiu povos ĉiu la kvin naciajn lingvojn de la Fundamento. Multaj el la paralelaj tradukoj en la Universala

Vortaro malharmonias inter si. Pri tio oni sin turnu al la vortoj de Zamenhof en la Antaŭparolo: "La *erareco* en la nacia traduko de tiu aŭ alia vorto ne prezentas grandan malfeliĉon, ĉar, komparante la kuntekstan tradukon en la aliaj lingvoj, oni facile trovas la veran senco de ĉiu vorto". Tiel volis Zamenhof gardi la severan netuŝeblecon de la Fundamento. Sed eĉ kie ne troviĝas efektivaj eraroj, estas apenaŭ eble, ke la diversaj nacilingvaj tradukoj precize korespondu inter si. Ekzemple, la unua radiko en U.V., nome *abat'*, ricevis francan tradukon *abbé*; sed *abbé* povas signifigi ankaŭ simple *pastro*. Nur per komparado de la kromsenoj kaj nuancoj de ĉiuj kvin tradukoj oni povas konkludi pri la signifolimoj de la Esperanta vorto kaj scii, ke *pastro* verŝajne ne estas unu el la Fundamentaj sencoj de *abato*. Nur tiel, ekzemple, oni povas juĝi pri la ĝusteco de la mencio (K) = Katolikismo post *abato* en Plena Vortaro; alivorte, ĉu povas esti nekatolikaj abatoj en la Fundamenta senco de la vorto? La "Danaidinoj", pri kiuj parolis D-ro Albault en sia enkonduko, la leksikologoj, kiujn atendas ĉi tiu laboro preskaŭ neelĉerpebla, devos esplori tiun kaj multajn aliajn demandojn, kaj komentarii siajn konkludojn per citado el la plej aŭtoritataj fontvortaroj nacilingvaj, antaŭ ol la granda Esperantista publiko povos "posedi" la tutan enhavon de la Fundamento. (Ne temas ĉi tie pri la simpla korektado de eraroj. Pri tio oni sin turnu al la Akademias Korektoj, kiuj formas parton de la recenzata volumo.) Unu afero ŝajnas evidenta, nome, ke la nacilingvaj signifoj, kiuj validas por ĉi tia enketo, devas esti tiuj de la koncerna epoko, t.e. de 1893 se temas pri U.V., ĉar, se Zamenhof volis eĉ ne la plej malgrandan ŝanĝon fari jam en 1905, oni rajtas konkludi, ke li mem rigardis la jaron de la *unua* eldono de la apartaj libroj kiel la jaron de fiksiĝo, ne nur de formoj, sed ankaŭ de signifoj fundamentaj. Ĉiuokaze pri la jaro 1962 (vidu paĝon 26 de la enkonduko al la 9-a eldono) ne povas esti demando. La naciaj lingvoj povas evolui en diversaj direktoj, kaj la grado de komuneco de signifo ĉe diverslingvaj terminoj povas malkreski kaj eĉ malaperi. Nia Fundamento ne staru sur sablo tia!

La stilo de la du *Noticoj* (Ĉu la francaj Esperantistoj vere sentas la bezonon de tiu vorto?) estas plejparte agrabla kaj eleganta, kvankam iritetis min la nelogika uzado de la prezenco en la Klariga Notico al la Deklaracio pri Esperantismo. Ŝokis "Ne baldaŭ mankos..." por "Baldaŭ ne mankos..."

Enhaven la *Noticoj* reprezentas grandan laboron esploran, pri kiu ni devus senti grandan ŝuldon al D-ro Albault kaj al liaj helpintoj.

Pri la teknika kvalito de la nuna eldono estas neeble komenti detale, ĉar en la momento de recenzado la verko ne estas finpresita. Tamen laŭ la presprovaĵoj oni povas diri, ke la Esperantaj Francaj Eldonejoj rajtas gratuli sin.

Kiel skribis lastatempe S-ro C. D. A. Capp: "Oni devas konfesi, ke en la pasinteco la Fundamento ne debitis, ĉar ĝi ne estis tre 'utila' libro por la progresinto, kaj certe ne por la komencanto. Mia opinio ĉi tiu eldono kun ĝia enkonduko, akademias korektoj, komentoj pri vortoj kaj lingvaj notoj k.t.p. estos io aparta, kaj ĝi certe interesos multe pli vastan klientaron, ol la 'nudaj' eldonoj."

Fine, ĉu ni rajtas esperi, ke iam aperos simila eldonaĵo pri la Oficialaj Aldonoj al la Universala Vortaro?

A. W. Rowe (Londono)

Monda Kulturo, Internacia Revuo pri Literaturo, Filmo, Teatro, kvaronjare eld. de UEA. Redaktoro William Auld. N-roj 3-a (printempo) kaj 4-a (somero). Jarabono: 15,— gld (60 st).*

La koncepto de monda kulturo estas vere radikala koncepto, eble pli radikala ol la koncepto de mondlingvo mem — eĉ se ĝi devis postsekvi ties akceptigon kaj enradikiĝon kiel ĝia natura konsekvenco kaj logika korolaro. La monda kulturo havis multajn radikojn en la pasinto de ĝin konsistigantaj naciaj kulturoj, sed ĝi ekkomencis flori antaŭ nelonge, preskaŭ antaŭ niaj propraj okuloj: la Internacia Lingvo, jam sufiĉe evoluinta por sia nova fiero rolo, iĝis la historie necesa esprimilo de ĝiaj unuecigaj, universalismaj tendencoj.

Same kiel nenia nacia kulturo iam estis aŭ estos "sufiĉa por pravigi ekziston" de ĝin reprezentanta revuo, kies programo estus izoligemo disde aliaj naciaj kulturoj, tiel ankaŭ esperanta revuo ne povas senpune starigi postulaton de memsufiĉeco de esperanta kulturo. Ŝajnas iom naive dividi literaturon, mondan aŭ nacian, en du strikte apartigitajn kategoriojn: originalan kaj tradukitan.

Roger Bernard, en sia recenzo pri la du unuaj numeroj de "Monda Kulturo" ("Esperanto", aprilo 1963), kvankam ne kverelante kontraŭ la fundamenta premiso mem, esprimiĝas tre skeptike pri ĝia nuna plenumebleco: "la postulato ankoraŭ tro fruas". Tiun skeptikismon konfirmas Redaktoro Auld jam en

la tria numero, allasante — feliĉe! — tri neoriginalaĵojn: "La Inferiro de Iŝtar", adaptita el la novasira kaj ŝumera lingvoj far de Kolomano Kalocsay, nia nesuperebla tradukisto-poeto, "Legendo pri La-Bi-Hauz" uzbekaj folklorajĵoj esperantigitaj de P. Poliŝĉuk, kaj tri poemoj de Marie Under, okaze de ties okdekjara jubileo, en traduko de Hilda Dresen.

La kvara, somera numero de "Monda Kulturo", kvankam denove malfidela al propra principo, kontinuas en sia lojaleco al bona prudento kaj racio, publikigante preskaŭ du paĝojn da tradukoj, ĉi-foje el "Dia Komedio", kaj de Kalocsay kaj de Peterlongo, kiel ilustraĵojn al "Ideologio kaj Poezio", profunda kritika eseo kontribuita de la Redaktoro mem.

La konkreta realo de la ambaŭ numeroj de nia plej grava literatura revuo impresas tre plaĉe kaj allogas: poemoj estas ĉiam altnivelaj, prozaj verkoj ĉiam interesaj kaj la aspekto grafika de l' tuto kaptegas tujan atenton de legonto.

Julius Balbin (Nov-Jorko)

Lingvo, Stilo, Formo, studoj de K. KALOCSAY. Eld. Librejo Pirato, Osaka, 1963. Foto-represo. 142 p. 18 × 13 cm. Klasika Esperantologia verko.

Oni bonvenigas la reaparon de konata verko jam antaŭ longe elĉerpita. Ĉar temas pri ofseta represo, la teksto restas neŝanĝita: nur nova 8-linia enkonduko estas aldonita.

Lingvo Stilo Formo estas kolekto da eseoj pri la lingvo. Ĝi montras alian flankon de la poeto Kalocsay, kaj meritas la atenton de ĉiu serioza studanto.

Du ĉapitroj traktas gramatikon. "Esperanta vortfarado" klare prezentas la radikalkategorian teorion pri vortmorfologio. De Saussure kaj Wüster ellaboris la ĉefprincipojn; Kalocsay malkovris la "vort-reefikon", kiu klarigas formojn kiel *grandkuraĝa*, *senforta*, *korvonigra*, *perlabori*. "Sendemandaj respondoj" konsistas el ĝenerale bonaj konsiloj pri (interalie) *la*; *iu* kaj *ia*; la modo post *kvazaŭ*; la volitivo; vortordo; virinaj nomoj (solvo per *Jozefa*, *Elizabeta* k.c.); *ata/ita* ("ofte erare intermiksataj"); kiel eviti kunmetitajn verboformojn; *ci* ("ĝi ripozu en paco"). En 1931 *deper* estis "ĵusnaskita"; ĝi tamen mortis jam, kaj en 1963 Kalocsay preferas *fare de*.

Mallonga ĉapitro pri fonetiko estas makulita de neklara uzo de terminoj ("ĉiu vokalo estu duonfermita"). Prave Kalocsay insistas, ke akcenta silabo devas esti ne nur laŭta sed longa. Sed ĉu tio implicas

variantojn vastan kaj malvastan de e kaj o en Esperanto, kiel en la germana? Laŭ mi ne; laŭ *Plena Gramatiko* jes.

Kvar ĉapitroj traktas la poezian lingvon: rimon (rimoido, agordo, adasismo, asonanco...), ritmon (ŝvebo, stumblo, karambolo, komenca ĥorjambo...), kaj la evoluon de nia poezia lingvostilo, kreita ĉefe de Grabowski, al kiu multaj ne konscias kiom la hodiaŭaj poetoj ŝuldas.

La libron finas sprita rekonstruo de la... mezepoka Esperanto, malkovrita de C. E. R. Bumy (*Amatuy fratrui! Pregiumz por animu isties povres homnes...*).

J. C. Wells (Londono)

La aventuroj de Zemen de To HOAI. El la vjetnama trad. Nguyen Minh KINH kaj Nguyen Minh TUNG. Eld. Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, 1963. 124 p. 19 × 13 cm.*

Ĉiam pli ofte aperas publikigaĵoj el Ekstremoriento. La plej nova el Vjetnamio estas "La aventuroj de Zemen", unu el la ĉefverkoj de To Hoai, verkisto famkonata dum la Dua Mondmilito pro siaj romanoj pri la vivo de kamparanoj kaj metiistoj. Aperinta unuafoje en 1942a, tiu libro nun prezentigas en esperanta traduko kiel modesta broŝuro 124-paĝa; presita sur malbonkvalita papero, malfortike bindita, ĝia tute senpretenda ekstero ne multe promesas. Tamen, jam ĉe la unua trafolumado agrable surprizas la plaĉaj ilustraĵoj, 12 tutpaĝaj kaj sennombraj malgrandaj disemitaĵoj tra la teksto. Certe, tiuj desegnaĵoj kun iom azia ekzotikeco kaj preskaŭ naiva simpleco ĉarmos plenkreskulojn same kiel infanojn.

Sed "La aventuroj de Zemen" estas infanlibro same malmulte kiom la originala teksto de "Vojaĝoj de Gulivero". La ĉefa heroo, granda grilo (= *zemen*), kaj liaj kunuloj, insektoj kaj aliaj bestetoj, posedas sufiĉe homecajn karaktertraĵojn, kaj ne necesas tro da fantazio por kompreni, ke la vivo de Zemen estas esence homa vivo kaj liaj idealoj homaj idealoj. Tiel komprenita, antaŭ la fono de la Dua Mondmilito, "La aventuroj de Zemen" prezentas interesan, kvankam ne nepre entuziasmigan legaĵon. Tamen, precipe la fino ne konvinkas. Ne ŝajnas kredeble, ke la "grandaj bestoj" senproteste, senprokraste akceptus "interbestan konvencion" pri tuja mondpaco, proklamitan de akridoj kaj formikoj. Bela revo, kiu eble povis konsoli la suferantojn dum militmizeroj, sed ni nuntempuloj sperdis, ke la afero ne estas tiel simpla, bedaŭrinde.

H. Lukesch (Munkeno)

Katolika Terminaro, Esperanto-latina, de H. G. WANNEMAKERS, S. J. kaj P. HUBERTENO OFM. Cap.; Eld. Internacia Katolika Informejo, Tilburg, Nederlando, 1963. 53 p. 20 × 14 cm., multobligita. Prezo: 1,20 gld (4,8 st).*

Ĉar la bezono de fakvortaroj konstante pliurĝiĝas, estas gratulinde, ke nun aperis ankaŭ Katolika Terminaro. Kvankam ankoraŭ nekompleta ĝi tamen estas kuraĝa kaj esperiga komenco. Tion garantias la nomoj de l' verkintoj.

Alfabeto ordigitajn Esperanto-esprimojn sekvas latinlingva traduko. Jen ni do havas bonegan pruvon por dubemuloj por la taŭgeco de Esperanto ankaŭ en ekleziaj rilatoj. Teologiaj literaturoj devas nepre ĉerpi el ĝi. Rekomendindaj estus tradukoj en nacilingvojn, por ke la verko konatiĝu al nekonantoj de Latino. Vojmontra estas tiurilate Terminaro de Sac. W. Flammer Deutsch-Esperanto.

Entute mi varme rekomendas la libron ne nur al IKUE-anoj, sed al ĉiu seriozulo.

Reinhard Haüpenthal
(Germanujo)

Kiel Lu Ban Majstriĝis, de GING-FAN, el la ĉina trad. TIKOS. Eld. Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino, 1963. 18 p. 19 × 14 cm. Bildrakonto por infanoj. Prezo: 0,25 gld. (1 st).*

18 paĝoj kolore ilustritaj kun teksto pri diligenta, lernema kaj helpema knabo Lu Ban, kiu kiel dekdujarulo estis forsendita malproksimen al ĉarpentistmajstro, plenumis malfacilajn taskojn, lernis diligentege la metion por poste servi al la homoj. En la praktikado li famiĝis. La popolo bone rememoras pri li. — Ĉievalida laŭdo de metidiligenteco.

F. Moravec (Flensburg)

Internacia Mondregno Kreiĝanta, de MARTINUS. El la dana trad. Peter ZACHO. Eld. Martinus-Instituto, Kopenhago, 1962. 88 p. 19 × 12 cm., bindita. Prezo: 3,90 gld. (15,6 st).*

Iom nebuleca bildo de kolektivisma mondregno bazita sur universala altruisma religio, kies principoj de amo kaj justo kaj de superreganta komunintereso sekurigas daŭran mondpacon.

Kvankam ne ĉiuj legantoj povos senrezerve akcepti la socian kaj religian konceptojn de la aŭtoro, la verko estas tamen rekomendinda pro la noblinteresa intereso kaj pripensiga enhavo.

Bela eldono. Malmultaj, neĝenaj

preseraroj. Malgraŭ kelkaj gramatike kritikeblaj esprimoj, majstra traduko kaj modela lingvo.

H. Boffejon (Brasschaat)

L'Edelvejso kaj la tri Vagabondinoj kaj **La Amo**, de Pierre DELAIRE. Eld. Esperantista Libro-Klubo "Edelvejso", Orléans, 1963. 56 p. 20 × 13 cm., ofsetita. Teatraĵeto plus citaĵaro.*

Temas pri unuakta fabela teatraĵeto. Personoj: 4 virinoj, 6 viroj. Tri fratinoj malriĉaj decidiĝas iri en montaron kaj tie peti la blankan edelvejson pri helpo en ilia mizero. En Alpoj oni vokas Edelvejson kaj kantas al li. La Edelvejso, surprizita ke homoj kantas al floro, aperiĝas al la vagabondinoj, kaj sendas ilin pli malproksime en la montaron; tie ili trovos ĝendarmon, kiu pere de sia magia ĉapelo donas al ili manĝaĵon, belajn vestaĵojn kaj monon, kiam ili promesas laboreme lerni Esperanton. Poste la ĝendarmo vokas tri fianĉojn por niaj vagabondinoj kaj la tuta afero feliĉe finiĝas.

Soňa Hodková (Praha)

Sintrompoj, de J. B. HIRSCHER, el germana trad. W. FLAMMER. Eld. IKUE, Nederlando, 1963. 36 p. 19 × 13 cm. Serio "Kristana Kulturo" n-ro 2. Prezo: 1,50 gld. (6 st). Eldonnumero 1500 ekz.*

J. B. Hirscher (1788-1865), germana profesoro pri katolika moralteologio, montras per sesdeko da ekzemploj, kiel malantaŭ ŝajne kristana boneco povas kaŝiĝi nekonsciataj egoismaj motivoj. Tiu malkovro de la "sintrompoj" celas plibonigon de la leganto, ĉar "komenco de saĝeco estas sinkono".

Hannelore Lukesch (München)

RICEVITAJ ELDONAĴOJ

Katolika Terminaro Germana-Esperanta, de Wilhelm FLAMMER. Eld. IKUE, 1963. 44 p. 17 × 11 cm. Prezo: 2,— gld. (8 st).

Grotto i Sverige (Grotoj de Svedujo), de Leander TELL. Eld. Centrocommerce A/B, Norrköping, Svedujo, 1963. 71 p. 21 × 15 cm. Katalogo kun resumo kaj klarigoj en Esperanto.

La surtera paco, encikliko de Papo JOHANO XXIII. Eld. IKUE, Heerlen, Nederlando, 1963. 61 p. 19 × 12 cm., kun frontispico kaj latina antaŭparolo. Serio "Kristana Kulturo" n-ro 3. Prezo: 2,50 gld. (10 st).

Nova Vortaro Esperanto-Ĉina. Eld. Ĉina Esperanto-Ligo, 1962. 2-a eldono, 5000 ekzempleroj. 327 p. 13 × 9 cm. Prezo: 3,— gld. (12 st).

Vocabulaire de poche Français-Esperanto (poŝvortaro franca-Esperanta), de Louis BASTIEN. Eld. Esperantista Centra Librejo, Parizo, 1960. 5-a eldono. 127 p. 12 × 9 cm. Prezo: 2,50 gld. (10 st).

Premier manuel de la Langue Auxiliaire Esperanto (unua lernilo de Esperanto). Eld. Esperantista Centra Librejo, Parizo 1962. 32 p. 14 × 10 cm. 650-a milo. Traduko de la ekzercaro de la sama, 3-a eld. 1962, 17 p.

Granda Moravio. Eld. Parko de Kulturo kaj Ripozo, Brno, 1963. 8 p. 21 × 15 cm. Ilustrita broŝuro pri la 1100-a jubileo de la bizanca misio al Moravio. Senpage distribuas: Kroužek Esperantistů, Parku kultury a oddechu, Brno, Ĉeĥoslovakio.

Bulgarino. Eld. Komitato de la Bulgaraj Virinoj, Sofia, 1963. 28 p. 31 × 24 cm, il.

Ĉeĥoslovakio en nombroj, eld. Orbis, Praha, 1962. Statistika faldfolio.

Bahasa Esperanto, Azas², Perkembangan dan Kemadjuannya (Esperanto, ĝia strukturo, evoluo kaj progresado) de LIEM Tjong Hie. Eld. la aŭtoro, Semarang, 1961. 32 p. 16 × 12 cm., il. Ĉefe indonezilingva, kun partoj ĉina, Esperanta kaj angla.

Steyr, Oberösterreich. Eld. urbo Steyr, Aŭstrujo. Turisma faldfolio kun aldonita teksto en Esperanto. Havebla kun 2 aliaj kontraŭ 1 rpk de Internacia E-Muzeo, Wien I, Hofburg, Aŭstrujo.

Skolta kaj tenduma terminaro, de J. K. HAMMER. Eld. Skolta Esperantista Ligo, 1963. 26 p., 18 × 11 cm., ilustr.

Vocabingo (Vocabulary Bingo). Eld. L. G. Hartridge, 64 Laurier Rd., Addiscombe, Croydon, Anglujo. Vort-ludo por anglalingvaj komentantoj de Esperanto.

What a University Student should know about Esperanto (kion devus scii universitata studento pri Esperanto). Nova anglalingva informilo mendebla ĉe S-ro J. A. Franklin, Emmanuel College, Cambridge, Anglujo, Minimuma mendo 20 ekz.

Pacemo, de Nikola STRANĜANSKI. Eld. Slava Esperantista Asocio, 1963. 60 p. 16 × 12 cm. Poemaro preskaŭ tute bulgarlingva, kun kelkaj Esperantaj paĝoj.

Tra la Mondo

Aŭstralio

● La organizantoj de la 14-a Aŭstralia Kongreso (Melbourne, 30 decembro—5 januaro), kiun inaŭguros parlamentano, promesas unuan premion de 5 aŭstraliaj pundoj (150 steloj), duan premion de 2 pundoj kaj 3 triajn premiojn de po 1 pundo al la sendantoj de la plej belaj aŭ interesaj aerpoŝtaj salutoj, ekspoziciotaj en la kongresejo. Sendu al: "Esperanto", Box 2122 T, Elizabeth St. P.O., Melbourne.

Britujo

● La mondekonata lernolibra serio "Teach Yourself", en kiu jam de 1957 ekzistas sukcesa lernolibro de Esperanto, baldaŭ enhavos ankaŭ vortaron angla-Esperantan kaj Esperanta-anglan. La vortaro, kiun preparas S-ro J. C. Wells, instruisto pri fonetiko en la Londona universitato, ampleksos inter 20.000 kaj 30.000 erojn.

● Jam la kvaran sinsekvantan jaron okazis dum aŭgusto diversnivela intensaj kursoj por instruistoj. La kolecion en Barlaston plenplenigis 44 kursanoj, tiel ke 15 ne povis trovi lokon. Prelegis Marjorie Boulton, John Wells, Juan Régulo Pérez, H. L. Elvin, Humphrey Tonkin kaj Raif Markarian.

Bulgarujo

● Oficialajn atestilojn pri Esperantlingva kapableco ricevis de la distrikta fako "Popola Klerigo" 11 sukcesintoj el kurso de 14 geinstruistoj dum aŭgusto en Rodopi-montaro.

Ĉinujo

● Kvar ĉambrojn plenigis arte aranĝita 8-taga Esperanto-ekspozicio en Pekino.



La mongola pioniro D-ro Rinĉen

Francujo

● Dum oktobro la eldonisto André Ribot daŭrigis siajn vizitojn al lernejoj, prelegante al pli ol 2700 gelernantoj en 16 urboj.

Germanujo

● Post longa paŭzo Esperantistoj povis denove kunveni kun oficiala permeso en Wilthen (Luzacio), por aŭdi raportojn pri la kongresoj en Sofio kaj Vraca.

● Pro ebleco nomigi straton "Zamenhof-strato", skribu instige al Stadtverwaltung (urbestraro), 8228 Freilassing.

Hindujo

● S-ino M. Haudebine, kiu laboras en Hindujo nome de APO (Agado en Proksima Oriento), dum julio vizitis la urbojn Ernakulam, Allepey, Trivandrum kaj Madras en la malajala- kaj tamila-lingvaj regionoj de suda Hindujo. Tie ŝi donis sep prelegojn por gejunuloj kaj studentoj, kiujn interpretis lokaj Esperantistoj, kaj intervjuon en la radio de Trivandrum. Rezulte de la radio-intervjuo kaj de gazet-artikoloj 136 personoj skribe petis informojn pri la Internacia Lingvo.

Hungarujo

● La Bulteno de la Ministerio de Klerigo komunikis, ke Esperanto estas instruebla kiel nedeviga, elekta lingvo en mezlernejoj kaj en apartaj kursoj en supraj klasoj de ĝeneralaj lernejoj (10-14 jaraj lernantoj).

● Por la novaj kursoj en la Universitato de Szeged enskribiĝis 58 studentoj (vidu p. 172).

Jugoslavio

● En la universitato de Zagreb okazis arablingva prelego pri la Internacia Lingvo por la arabaj studentoj.

Mongolujo

● Plua indiko pri la reinteresiĝo pri la Internacia Lingvo estis vizito de D-ro Rinĉen (foto), mongola lingvisto, al hungaraj Esperantistoj dum oktobro. D-ro Rinĉen gvidis la unuajn Esperanto-kursojn en la mongola ĉefurbo, Ulan Bator, en 1933.

Svisujo

● La 7-a internacia skisemajno okazos en Adelboden en Bernaj Alpoj de la 26-a de decembro ĝis la 4-a de januaro. Informas: Cosette Giroud, Jonquilles 8, La Chaux-de-Fonds.

Laŭfake

Blinduloj

● Nun brajligata estas la originala verko de kapitano Lundquist, "Ŝipestro rakontas". El la Nacia Porblindula Biblioteko en Londono ĝi estos pruntebla kie ajn en la mondo.

Filatelio

● Okaze de la 7a Internacia Semajno de Korespondado (7-14/10) aperis en Pollando speciala poŝtstampo kun tekstoj pola kaj Esperanta.


Literaturo

● Novan literaturan revuon ekelonis Kansai Ligo de Esperanto-Grupoj (Nakatu-hamadōri 2-20, Oyodo-ku, Osaka, Japanujo). Sub titolo "Kajero N-ro 1" prezentigas 12 originalaj kaj tradukitaj prozaĵoj: eseoj, literatur-kritiko, dramo, noveloj, k.s., ampleksantaj entute 80 paĝojn. Ĉiuj verkintoj estas japanoj. La revuo estas multobligita. Abonkotizo ne indikita.

● Grava usona revuo "Books Abroad" (eksterlandaj libroj) en jubilea artikolo pri estona poetino Marie Under dufoje menciis Esperanton kiel solan lingvon, kiu posedas tradukitan kolekton de ŝiaj poemoj.

ŜAKA RUBRIKO

Gvidas: D-ro V. Faigl, Zlonice, Ĉeĥoslovakio



Problemo n-ro 32 (Konkurso 1963 — n-ro 8) A. Oberhänsli
Mato en 3 movoj.

Kontrolo:

Bl.: Rb8, Df2, Kc1, Cb4, Cd6. p.: a5, b3, c4, d2, f6, h4

Ni.: Re5, Kd8, Kg8, Cf1, p.: c5, c6, e6

Solvojn sendu al gvidanto de la rubriko ĝis 31.3.1964.

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Largantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

Por tempoj kaj ondlongoj vidu la oktobran numeron.

Radio Roma. 3-XII, Tra la literaturo; 6-XII, Fiŝkaptado en Apulio; 10-XII, Novaĵoj el Italujo; 13-XII, Novelo de Di Giacomo: "Ĉu vi volas la kiseton?"; 17-XII, Italaj kanzonoj en Esperanto; 20-XII, Kiel ni malakriĝu la Kristnaskan froston?; 24-XII, Leterkesto; 27-XII, Italujo kaj fremdaj verkistoj: Lord Byron; 31-XII, Metaponto kaj ĝiaj temploj. Krome, ĉiun merkredon, kuriero de Esperanto. Prelegantoj: S-ro Luigi Minnaja kaj Prof. D-ro Vincenzo Musella.

Radio Praha. La decembra programo okazos eksterkute la antaŭlastan ĵaŭdon, tio estas la 19-XII. Temo: "Kion ni atendas de la Novjaro 1964? (Voĉoj de niaj aŭskultantoj)". Ondlongo: 233 m. Tempo: Inter 17.15 kaj 18.00 dum germanlingva programo.

Radio Zagreb. La programo nun okazas unu horon pli malfrue, tio estas de 23.05 ĝis 23.30. Ondlongo: 264 m.; ĉiun ĵaŭdon.

Pola Radio. Vidu novan liston de ondlongoj en la novembra numero.

Svisa Radio. Lunde kaj merkrede la programo estas nun dissendata dek minutojn pli frue, tio estas de 12.10 ĝis 12.20. Ondlongoj: 48.66 m., 31.46 m., 13.94 m. Neniu ŝanĝo pri la vespera programo ĵaŭdon kaj sabaton.



49-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Den Haag, 1-8 Aŭgusto 1964

Sub la Alta Protektado de Ŝia Moŝto Juliana, Reĝino de Nederlando.

Konstanta Adreso: U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 3

Rotterdam, la 11-an de nov. 1963

Antaŭkongreso.

Antaŭkongreso okazos en Bruselo (Belgujo) de la 30-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 1964. La aliĝkotizo (100 b. fr.) kovras la administrajn kaj organizajn kostojn, sed ĝi ne inkluzivas manĝojn kaj ekskursojn. Detalajn informojn donas la Organiza Komitato de la Antaŭkongreso, 13 rue de la Reinette, Bruselo.

Postkongreso.

Oficiala postkongresa manifestacio okazos en Leeuwarden (Nederlando) de la 8-a ĝis la 12-a de aŭgusto 1964. Detalajn informojn

donas F-ino A. A. Laverman, Julianalaan 81 B, Leeuwarden.

Senpagaj Partoprenoj.

Esperanto-Societoj, kiuj premie disponigas senpagajn partoprenojn en la 49-a Universala Kongreso al gajnintoj de lokaj konkursoj, estas petataj anonci sin ĉe la konstanta adreso de la Kongreso.

Adoptaj Gepatroj.

Ankaŭ okaze de la 49-a Universala Kongreso estas malfermita la ebleco por ĉiu esperantisto kaj Esperanto-Societo kontribui al la Fondaĵo "Adoptaj Gepatroj". Per la kolektita mono la Loka Kongresa Komitato ebligas la partoprenon en la 9-a Internacia Infana Kongresejo al infanoj el nepagipovaj landoj aŭ de nebonstataj familioj. La fiksita kotizo por la Fondaĵo "Adoptaj Gepatroj" estas 30.— ned. gld.

Statistiko (ĝis 11-11-1963).

Argentino 1, Aŭstralio 1, Aŭstrujo 3, Belgujo 7, Brazilo 2, Britujo 18, Bulgarujo 271, Ĉeĥoslovakujo 5, Danlando 8, Finnlando 3, Francujo 45, Germanujo 27, Hispanujo 2, Hungarujo 52, Israelo 1, Italujo 4, Japanujo 5, Jugoslavio 41, Kuvajto 1, Madagaskaro 1, Nederlando 59, Norvegujo 3, Nov-Zelando 1, Pollando 85, Sovetunio 1, Svedujo 10, Svisujo 2, Usono 2. Entute 661 el 28 landoj (Pasintjare 202 el 27 landoj)

G. G. Pompilio

Konstanta Kongresa Sekretario

Dekstre: unu el la salonoj de la 49-a U.K.



AL LA
50-a EN
TOKIO

Vojaĝo. Kiel anoncote UEA organizos internacian karavanan vojaĝon aviadilan. Sed plurfoje oni demandas ankaŭ pri la eblecoj per vagonaro kaj ŝipo. Tiam vojaĝon UEA ne organizos, sed ĉiu ajn povos individue aŭ grupe iniciati tian vojaĝon.

La sekvantajn detalojn sendis al ni S-ro Henri Dabiez, Avenue Débidour 2, Paris 19, Francujo:

De Parizo al Moskvo, estas ĉiutaga vagonaro, 46 horoj da vojaĝo. Prezo, ir- kaj reiro: 1-a-klasa litvagono, 936 fr.fr.; 2-a-klasa litvagono, 627; 1-a klaso, 600 fr, 2-a klaso, 435 fr.


De Moskvo al Ĥabarovsk (Khabarovsk), ĉiutaga aviadilo, 8 h 20 da vojaĝo. Prezo, ir- kaj reiro, inkluzive du manĝojn: 1180 fr.fr.


De Ĥabarovsk al Naĥodka, vagonaro, 18 h. 35 da vojaĝo. Prezo, ir- kaj reiro: 1-a klaso, 207 fr.fr.; 2-a klaso 176 fr.

De Naĥodka al Jokohama, ŝipo, 53 horoj da vojaĝo. Prezo, ir- kaj reiro, inkluzive la manĝojn: luksa klaso, 992 fr.fr.: 1-a klaso, 662; 2-a klaso, 591; 3-a klaso, 485.

Sume, de Parizo al Jokohama, 8 tagoj da vojaĝo. Prezo, ir- kaj reiro: luksa klaso, 3315 fr.fr. 2400 guldenoj); meza klaso, 2600 fr. (1900 gld.); malkara klaso 2276 fr. 1700 gld.).

La plej tikla punkto en tiu vojaĝo estas la ŝipo de Naĥodka al Jokohama. Ĝi normale cirkulas unu fojon monate en ĉiu direkto. Okaze de la Olimpiaj Ludoj, la Rusoj cirkuligos ĝin du fojojn en la monatoj de Junio ĝis Septembro, kaj dek fojojn en Oktobro. Ni sugestas, ke interesitoj turnu sin por pliaj informoj al S-ro Dabiez.





LA JUNA VIVO

Ĉion por la redakcio de "L.J.V." sendu al:
Ivo Osibov, Splitskog odreda 15, SPLIT,
Jugoslavio.

STELO KVINJARA

Kiam en la jaro 1958, dum la 43-a Universala Kongreso, grupo de iniciatintoj starigis STELO-n, ili samtempe konsciis ke se ekzistas studentoj-esperantistoj en la mondo, do devas ekzisti studenta organizaĵo esperantista, kiu unuigos ilin kaj plenumos iliajn esperantistajn bezonojn, revojn, dezirojn, kulturajn emojn kaj sciencajn interesiĝojn.

Plej ĉefaj taskoj kaj celoj de la nova organizo estis difinitaj en ĝia statuto: "STELO, kiel studenta sekcio de ISAE celas:

- disvastigi la internacian lingvon inter studentoj
- antaŭenigi ĝian praktikan aplikadon en internaciaj studentaj rilatoj
- akceli la internacian kunlaboron de studentoj-esperantistoj".

Mondan agadon de STELO oni konceptis kaj bazis je la agado de landaj kaj lokaj reprezentantoj de la Ligo kaj stud. esp. kluboj. En la jaro 1960, STELO entreprenis grandan kampanjon celantan elvoki favoron kaj pluan intereson al esperanto, flanke de diverslandaj altlernejoj. Tiucele, kune kun UEA oni prilaboris kaj eldonis t.n. "Seslingvan faldfolion", kiun subskribis kvindek profesoroj altlernejaj el diversaj landoj. La "faldfolio" disiris al multaj landoj kaj distribuata al altlernejestroj kaj altlernejaj aŭtoritatuloj estis gravega paŝo por akiro de pli bona atmosfero por esperanta lingvo flanke de ili. Dank' al ĝi en pluraj superaj lernejoj ekestis novaj kursoj, katedroj de esperanto kaj kluboj.

Dum ĉiu UK okazas jarkunveno de STELO. Krom ĝi, en la jaro 1961 dum la 46-a UK okazis unua t.n. "Fakkunveno de STELO". Ĝi estis nova formo de kunveno, kiu donas eblecon pridiskuti tiujn temojn, kiuj speciale interesas studentojn. Nun fakkunvenoj okazas ĉiujare.

Aktivado de STELO penetras ĉiam novajn teritoriojn kaj mediojn de studentaro, ĝi penetras en Azion kaj Sudan Amerikon, kie ankaŭ komencas kreski intereso al ties agado.

En la jaro 1962 nia tiam Vicprezidanto Victor Sadler, faris multajn prelegojn en altlernejoj kaj superlernejaj medioj de Cejlono.

El landoj, en kiuj ekzistas organizitaj studentaj grupoj aŭ kunlaborantoj de STELO oni povas menciigi speciale: Anglujon, Belgujon, Brazilon, Bulgarujon, Francujon, Germanujon, Hungarujon, Italujon, Japanujon, Jugoslavion, Norvegujon, Koreon, Svedujon, Sovetunion, Polujon, Rumanujon, Nederlandon, Vjetnamion k.a.

Ĉiam ankoraŭ ni havas malfacilaĵojn pri interŝtata pagado, abonado, organizado de niaj laboroj en "novaj landoj". Ni havas ankaŭ problemon pri nia gazeto "Studento", kiu ne estas memstara sed aperas kune kun tre al ni favora "Kial Ne?" de JEB.

Fari nian agadon pli kaj pli sukcesa signifas: havi reprezentantojn en pli multaj landoj kaj "akiri" ĉiujn kontinentojn, pere de reprezentantoj starigi landajn STELO-komisionojn, kaj tie kie estas eblecoj landajn studentajn esp. organizojn. Reprezentantoj, komisionoj kaj landaj organizoj devas vidi kaj gvidi konkretajn taskojn en kadro de STELO-agado kaj ĉiujare resumi laborojn, tiurilate plibonigadi metodojn kaj starigadi novajn taskojn.

Dum la lasta studenta ferio ni okazigis unuan tiel nomatan "STELO-semajnon" en Primoŝteno, kie dum sep tagoj studentoj el ok landoj (ankaŭ el Japanujo tri personoj) ĝuis somerumadon, pridiskutis specialajn temojn, aŭskultis altnivelajn prelegojn, prezentadon de studenta teatro el Jugoslavio, distrajn aranĝojn ktp. Verŝajne tiaj aranĝoj de STELO fariĝos ĉiujaraj. Kaj mi povas anonci ke simila estas planata ankaŭ por la jaro 1964.

Mi devas aldoni ke post elektoj al nova estraro, kio okazis en Sofio, ĉefan estraron de STELO konsistigas gestudentoj el jenaj landoj de du kontinentoj: Polujo, Francujo, Italujo, Japanujo, Sovetunio kaj Bulgarujo.

Per niaj aktivecoj ni deziras akiri fiksitajn celojn kaj tiamaniere aliĝi samtempe al tutmonda batalado por la daŭra Paco kaj amikeco inter nacioj.

mag. R. Skalinski
Prezidanto de STELO

KIEL ASPEKTAS LA EŬROPA KULTURO ?

Pri tio temos la 7a Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo, kiu sub honora protektado de la ĉefurbestro de Munkeno, D-ro Hans-Jochen Vogel, okazos de la 27a de Decembro 1963 ĝis la 2-a de Januaro 1964 en la junulargastejo "Burg Schwaneck" en München-Pullach pri la temo: "Eŭropa kulturo – ĉu unueco en vario?" La programo ampleksos i.a. jenajn prelegojn:

Prof. D-ro Ivo Lapenna: "Eŭropa spirito en la spegulo de fundamentaj juraj principoj" (2 prelegoj);

Prof. Reto Rossetti: "La arto kiel hom-fenomeno" kaj "La evoluo de la Eŭropa pentroarto" (ambaŭ kun diapozitivoj);
D-ro Victor Sadler: "Kulturo aŭ kulturoj?"

John C. Wells, M.A.: "Parencaj trajtoj en la Eŭropaj lingvoj";

Stefan Maul, cand. theol.: "Bazaj trajtoj de la Eŭropa kulturo el historia vidpunkto".

Krome konsentis partopreni Red.

Walerian Włodarczyk el Varsovio. Li antaŭvideble prelegos pri "Markismo kaj ĝiaj fontoj en la Eŭropa spirito".

Tamen la seminarianoj ne nur aŭskultos prelegojn aŭ diskutos! Kontrastas la diversaj distraĵoj: Vizito al la bavara metropolo – "studvizito" al la amuza kvartalo Schwabing – gvidado tra la Germana Muzeo – diskutado kun la neesperantista junularo – kaj fine... la tradicia Silvestra Balo! Antaŭvidita estas komuna vizito al la iama nazia koncentrejo Dachau, kiu nun estas memorejo pri la viktimoj de la hitlerismo.

Gejunuloj (malpli ol 25-jaraj) pagos la kotizon de 60 gm kaj ricevos repagon de 15 gm el la kotizo kaj krome repagon de 50% el siaj vojaĝelspezoj sur okcidentgermana teritorio. Pliaguloj rajtas partopreni, pagante 70 gm. La kotizo ampleksos ĉiujn kostojn por tranoktado, tri po-tagaj manĝaĵoj kaj seminaria programo.

Petu aliĝilojn kaj pli detalajn informojn de la prezidantino de la Organiza Komitato de la 7a IS, F-ino Hannelore Lukesch, 8 München 15, Pettenkoferstr. 32. Aŭ vi rekte sendu tien paperfolieton kun indikoj pri viaj nomo, kompleta adreso, naskiĝdato kaj profesio. Samtempe ĝiri (se eblas pro devizaj kaŭzoj) antaŭpagon de 10 gm al la poŝtĉekkonto de GEJ: Karlsruhe 54577 (por: Deutsche Esperanto-Jugend, 29 Oldenburg).

Ulrich Lins
Vicprezidanto de GEJ

Decembro

- 10 Tago de Homaj Rajtoj (p. 186)
 15 Zamenhof-Tago, Libro-Tago (p. 209)
 26-28 Meksika Kong. Guadalajara
 26-1/1 Skiferioj Aŭstrujo (p. 194)
 26-4/1 Svisaj skiferioj (p. 215)
 27-2/1 Seminario GEJ (p. 217)
 28-1/1 N-Zelanda Kong. Wellington
 30-5/1 Aŭstralia Kong. Melbourne
 31 UK-kotizoj Hago plialtiĝos

Januaro

- 13-19 Brazilia Kongreso Fortaleza

Marto

- 30-5/4 Kultura semajno Grésillon
 31 UK-kotizoj Hago plialtiĝos

Aprilo

- 30 Limdato Int. Ekzameno (p. 202)

ESPERANTISTA VIVO

Naskiĝo

BAYS. Je 3.6.63 en Xapecó, Brazilo, unua filo Rikardo Anĝelo por Ges-roj Gersi Alfredo kaj Adolfin Bays.

Jubileo

TERRIJN. Okaze de sia 50-jara Esperantisteco, F-ino J. Terriijn en Belgujo decidis donaci por la domo de UEA 50,— gld. — t.e. po 1,— gld. por ĉiu jaro. Dankon kaj gratulojn!

NEKROLOGO

FOP. La Redaktorino de "L'Esperanto", organo de Itala Esperanto-Federacio, F-ino Gina Fop, mortis pro korkolapso je 8.7.63.

Ni Citas

El artikolo: "Delegitoj al tutmonda konferenco pri elektra povo vizitas la Nov-Zelandan projekton uzante naturan vaporon".

El Informoj de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato: "La reeĥo el eksterlando... vidigas ĉiujn karakterojn de 'libervoleco', t.e. de neprecizo. Gratuloj ne povas anstataŭi solidan teknikan artikolon kaj efektivan interŝanĝon de spertoj."

El "Historio de la lingvo Esperanto" II, p. 111: "Junuloj kaj adultuloj inteligentaj lernas per dudek lecionoj kaj sama nombro da hejmaj ekzercaj horoj."

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

OFICIALA INFORMILO N-ro 363 La 1-an de novembro 1963

DELEGITOJ

Argentino

- Buenos Aires (Capital Federal) FD (Arkitekturo): vakas.
 Córdoba (Córdoba) D: vakas.
 FD (Juro): vakas.
 Mendoza (Mendoza) FD (Lingvistiko): vakas.

Aŭstrujo

- Felixdorf (Wr. Neustadt) D: vakas.
 Wien ĉ. 1.800.000 FD (Historio): Dr. Ernst Joseph Görlich, profesoro pri historio, Arsenal, Obj. V.-III/III/8.

Belgujo

- La Louvière D: vakas.

Brazilo

- Campinas (São Paulo) 22.000. FD (Ĵurnalismo): S-ro Oscar Hoff, kontisto, Rua Ferreira Penteado 322; C.P. 1064.
 Florianópolis (Santa Catarina) D: vakas.
 FD (Statistiko): vakas.
 Itabuna (Bahía) VD: vakas.
 FD (Instruado): vakas.
 Pompéu (Minas Gerais) D: vakas.
 FD (Filatelo): vakas.
 Porto Alegre (Rio Grande do Sul) FD (Filatelo): vakas.
 Rio de Janeiro (Guanabara) FD (Blindula klerigado): vakas.
 FD (Radioamatorismo): vakas.
 FD (Ŝparkaso): vakas.
 Santo Amaro (Baía) D: vakas.
 Santo André (S. Paulo) FD (Kemio): vakas.
 FD (Naturscienco): vakas.

Britujo

- Aberdeen (Skotlando) FD (Ĵurnalismo): vakas.
 Dunfermline (Fife) D: vakas.
 Kendal (Westmorland) D: vakas.
 FD (Turismo): vakas.
 Leeds (Yorkshire) FD (Doganaĵ kaj Akcizaj aferoj): vakas.
 Southsea (Hants) D: vakas.

Bulgarujo

- Kolarovgrad FD (Transporto): vakas.
 Nova Zagora D: vakas.
 Sofija FD (Elektraj maŝinoj): vakas.
 FD (Filatelo): vakas.
 Varna FD (Komercaferoj): vakas.
 FD (Paco): vakas.

Ĉeĥoslovakujo

Brno

- FD (Literaturo): vakas.
 Červená Voda (Morava) D: vakas.
 FD (Kooperativismo): vakas.
 FD (Kuirarto): vakas.
 Havířov (Morava) FD (gimnastiko, sporto): vakas.
 Hronov (Čechy) D: vakas.
 Lázně Jeseník (Morava) D: vakas.
 FD (Turismo): vakas.
 Městec Králové (Čechy) D: vakas.
 Nové Zámky (Slovensko) D: vakas.
 FD (Geografio): vakas.
 FD (Instruado): vakas.
 Pardubice (Bohemio) FD (Turismo): vakas.
 Žilina (Slovensko) D: vakas.

Ĉilio

- San Fernando (Colchagua) D: vakas.

Danlando

- Lyngby (Sjaelland) FD (Skoltismo): vakas.

Finnlando

- Sulkava (Mikkelin lääni) D: vakas.
 Vaasa FD (Stenografio): vakas.

Francujo

- Bezons (Seine et Oise) 25.000. D: S-ro Michel Duc Goninaz, licea instruisto pri rusa lingvo, 11 rue Nicolas-Louet.
 Bourg-de-Péage (Drôme) D: vakas.
 Commentry (Allier) D: vakas.
 Courbevoie (Seine) FD (Pac-Movado): vakas.
 Evreux (Eure) D: vakas.
 La-Houssaye-en-Brie (Seine-et-Marne) 600. FD (Abelkulturo): S-ro René-Jean Marmou, romkatolika misiisto, Prieuré Saint-Martin; tel. 25.
 Le Havre (Seine Maritime) D: vakas.
 Lille (Nord) 200.000. FD (Kemio): S-ro Jean-Paul Vilhelm, profesoro pri kemio, Résidence Académique ch. 79 pav. 3, Av. Denis-Cordonnier.
 Oyonnax (Ain) FD (Maŝinoj por modleblaj materialoj): vakas.

Paris

FD (Fotografio): S-ro J. L. Mahé, reklamfotografisto, Vic-prezidanto de la Franca Federacio de l'Profesia fotografo, 26, rue du Renard (4è); tel. ARC 64-64.

FD (Kulturaj aferoj): S-ro E. F. Gaudry, kontisto, 127 avenue du Général Leclerc, Paris 14e.

Pfastatt (Haut-Rhin)

D: vakas.

FD (Entomologio): vakas.

Rouffignac (Dordogne)

D: vakas.

Ruelle (Charente)

FD (Naturismo): S-ro Michel Massemin, oficisto, 79, route du Pontouvre.

Vals-Les-Bains (Ardèche)

D: vakas.

Germanujo

Augsburg (Bayern)

D: vakas.

Dresden (Sachsen)

D: vakas.

Eisenach (Thüringen)

D: vakas.

Freiberg (Sachsen)

D: vakas.

Gotha (Thüringen)

D: vakas.

FD (Naftoborado): vakas.

Halle (Sachsen-Anhalt)

D: vakas.

Karl-Marx-Stadt

D: vakas.

Niedermarsberg (Westfalen)

FD (Tekniko): vakas.

Troisdorf/Siegkreis

(Nordrhein-Westfalen)

D: vakas.

Hindujo

Bombay D: vakas.

Hispanujo

Las Palmas de Gran Canaria

(Islas Canarias)

FD (Japanologio): vakas.

Linares (Jaën)

D: vakas.

Madrid

FD (Metalurgio): vakas.

Sabadell (Barcelona)

FD (Sportoj): vakas.

Santa Cruz de Tenerife (Kanariaj Insuloj)

D: vakas.

FD (Meĥanika transporto): vakas.

Hungarujo

Budapest VD: vakas.

FD (Pedagogio): vakas.

Orosháza (Békés-departemento)

D: vakas.

FD (Juro): vakas.

Pápa

FD (Literaturo): vakas.

FD (Terkulturo): vakas.

Israelo

Qiryat Motzkin (Emek Zevulon)

FD (Filatelo): vakas.

Italujo

Acireale 45.000.

D: S-ro Franco Grasso, aŭto-teknikisto, Via Genuardi 17.

Asti 60.000.

D: S-ro Aldo Conti, komunuma oficisto, Via Raffaello Sanzio N 15; tel. 51 805; 54 113 (oficejo).

Avenza (Carrara)

FD (Filatelo): vakas.

Bolzano VD: vakas.

Grottaferrata (Roma)

D: vakas.

FD (Filatelo): vakas.

Livorno

FD (Bankaj aferoj): vakas.

Messina

FD (Edukado): vakas.

Milano

FD (Fabrikado de teksaĵoj):

S-ro Giuseppe Zambon, teks-teknikisto, Gruppo Esperantista Milanese, Piazza Oberdan 1.

Trieste

FD (Doganaj aferoj): vakas.

Japanujo

Okayama

D: vakas.

FD (Medicino): vakas.

Jugoslavio

Beograd

FD (Librotenado): vakas

FD (Radio-tekniko): vakas.

FD (Studentaj aferoj): vakas.

Ljubljana (Slovenio)

JD: vakas.

FD (Ekonomio): vakas.

Novi Sad (Vojvodina)

VD: vakas.

Osijek (Hrvatska)

FD (Instruado): vakas.

Skopje (Makedonujo)

D: vakas.

FD (Filatelo): vakas.

FD (Juro): vakas.

Vršac (Vojvodina)

D: vakas.

Zagreb (Hrvatska)

FD (Terkulturo-selektado de plan-toj): vakas.

Zrenjanin (Vojvodina)

FD (Librotenado-fervoja): vakas.

Kolombio

Bogota

D: vakas

Madagaskaro

PERANTO: S-ro Roger Randrianekena, IVH 165, Mandialaza, Tananarive.

Tananarive

VD: vakas.

Maroko

Casablanca 682.400

D: S-ro Ben Ohana, Profesoro, Immeuble Facit, 24 Rue de la Drôme; tel. 298-57.

FD (Instruado) la D.

Nederlando

Eindhoven (Noord-Brabant)

FD (Teksindustrio): vakas.

Haarlem (Noord-Holland) 170.000.

D: S-ro Hendrik Jan Wielinga, oficisto de pontoj kaj ŝoseoj, Timorstraat 25.

FD (Trafiko): la D.

Schoorl 4000.

FD (Kamparaninaj aferoj): S-ino Johanna H. Hoekstra-Sieders, tajpistino, Frederikslaan 47; tel. (02209) 565.

FD (Kulinaj fakoj, instruado): S-ro Oene Hoekstra, inspektoro de kulinara instruado, Frederikslaan 47; tel. (02209) 565.

Norvegujo

Orkdal (Sór-Trøndelag)

D: vakas.

Nov-Zelando

Auckland 500.000.

FD (Virinaj aferoj): S-ino Patricia De Cleene, 25 Dexter Avenue.

Christchurch (Canterbury) 278.000.

VD: S-ro William James Wyber, kontkomizo, Flat 1, 84 Mersey Street, St. Albans; tel. (hejmo) 53-774, (oficejo) 65-759 (33).

Gisborne 25.000.

D: S-ro Frank Wise, eksfabrikisto, 2 Salisbury Road; tel. 3865.

Hastings (Hawkes Bay) 24.700.

D: F-ino Agnes Isobel Bray, radio-verkistino, 409 Alexandra Street; tel. 83.123.

Herald Island (Auckland) 300.

FD (Religio-anglikanismo): S-ro Harry Edwin Facer, emerito, Box 68.

Johnsonville (Wellington) 7.000.

FD (Hortikulturo): S-ro Thomas Joseph Higgins, emerita oficisto, 75 Moorefield Road; tel. 75-214.

Lower Hutt (Wellington) 56.000.

D: S-ro Kevin Boyd, departementa administranto, 128 Gracefield Road; tel. 697-419.

VD: S-ro Wingate Greenaway Nicholson, ŝtatoficisto, 97 Wyndrum Avenue; tel. 697-804.

FD (aŭtomobilaj aferoj): la D.

Oratia (Auckland) 1000.

D: S-ro Filipo Sunde, fruktĝardenisto, Shaw Rd.

Palmerston North

(Manawatu) 46.000

VD: S-ro W. J. Hall, kolegia instruisto, 36 Argyle Ave.; tel. 8 72 16.

FD (Edukado): la VD.

FD (Elektro-tekniko): S-ro Anthony Wilton, radio-teknikisto, 81 Clyde Crescent; tel. 82.754.

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1963

Stato je la 31-a de Oktobro

KONKURSO I

Lando	kvoto	poentoj	%	15.	Lando	kvoto	poentoj	%
1. Finnlando	2570	2900	112,84	16.	Norvegujo	1755	1605	91,45
2. Japanujo	3240	3630	112,04		Germanujo	7221	5200	72,01
3. Nederlando	5068	5425	107,04	KONKURSO II				
4. Francujo	7225	7725	106,92	1.	Nov-Zelando	1167	1416	121,34
5. Svedujo	6640	7030	105,87	2.	Aŭstralio	1233	1395	113,14
6. Danlando	2936	3089	105,21	3.	Israelo	460	460	100
7. Usono	4110	4255	103,53	4.	Kanado	769	737	95,84
8. Jugoslavio	5180	5270	101,74	5.	Madagaskaro	250	236	94,40
9. Svislando	2141	2165	101,12	6.	Portugalujo	515	485	94,17
10. Britujo	6368	6399	100,49	7.	Argentino	905	810	89,50
11. Italujo	4220	4185	99,17	8.	Islando	250	215	86,—
12. Brazilo	3856	3684	95,54	9.	Aŭstrujo	1475	1020	69,15
13. Hispanujo	2696	2480	91,99	10.	Urugvajo	250	135	54,—
14. Belgujo	1695	1555	91,74	11.	Sudafriko	250	90	36,—

Vidu la regulojn sur paĝo 26 (Febr. 1963)

Petone (Wellington) 12.000

D: S-ino J. Jaeger, instruistino, 43 Kensington Avenue; tel. 6 40 71.
FD (Edukado): la D.

Seacliff (Otago) 200

D: S-ro J. Townley, ĉefĝardenisto, Kilgour St.
FD (Hortikulturo): la D.

Takapuna City (Auckland) 20.500

D: F-ino S. F. N. Hill, 24 Eversleigh Rd.
FD (Sangdonado): la D.
FD (Virinaj aferoj): la D.

Taradale (Hawkes Bay) 5.250.

D: S-ro Robert Harding, ĉarpentisto, 21, Hammond Street; tel. 8361.
FD (Domkonstruado): la D.

Tauranga (Auckland) 22.000

VD: S-ro J. Baker, ŝtatoficisto, 22 Selwyn St.; tel. 6 28.
FD (Inĝenieraj aferoj): la VD.
FD (Florkulturo): S-ino Ellen M. Unsworth, R.D. 2; tel. 1075 D.

Trentham (Wellington) 17.550.

D: S-ro Walter Thomas May, soldato, 18 Ngata Grove; tel. UH. 3727.
FD (artefarita humo): la D.

Upper Hutt (Wellington) 17.550.

VD: S-ino Mary Richardson, helpinstruistino, 78 Thackeray St; tel. 4605.
FD (Amatora Radio): S-ro Edwin James Lawson, doklaboristo, 22 Byron St.
FD (Virinaj aferoj): la VD.

Waiouru Military Camp

(Wellington) 2000
D: Majoro H. W. R. Petersen, armea oficiro, National Service Training Unit; tel. 899 et 509.
FD (Filatelo): la D.

Wanganui 33.000

VD: S-ino V. Moore, oficistino, 33 Selwyn Crescent; tel. 56 89.
FD (Edukado): S-ro John B. Whalley, instruisto, 16 Plunket Street, Durie Hill; tel. 2/2271 D.
FD (Turismo): S-ino Muriel Delves, Dommastrino, 22 Roberts Avenue, Aramoho; tel. 38897.

Wellington (Wellington) 200.000.

D: S-ro Walter Joseph Donovan, emerita telegrafisto, 51 Central Terrace, Kelburn; tel. 27-195.
VD: S-ro Nelson Hill, ŝtatoficisto, 15 Eagle Street; tel. 77.846.
FD (Plastaĵoj): S-ro Edgar Andrew Hornblow, fabrikisto, c/o Apex Plastics, 70 B Riddiford Str.; tel. 88-203.
FD (Sporto: ŝako): vakas.
FD (Studentaj aferoj): vakas.
FD (Virinaj aferoj): S-ino J. Hill, dom-mastrino, 15 Eagle St., karo-ri; tel. 7 78 46.

Whangarei (Northland) 20.000.

D: S-ro Francis A. Tocker, emerita lernejestro, 33 Te Mai Road; tel. 82256.
FD (Sporto-futballudo): la D.

Pollando

Białystok D: vakas.

Bochnia D: vakas.

Gdańsk-Orunia D: vakas.

Jurków (Krakow)

FD (Katolikismo): S-ro Stanisław Hilary Hochół, sacerdote, Jurkow 135, pow. Limanowa.
FD (Psikologio): la FD pri Katolikismo.

Kraków

FD (Ĵurnalismo): vakas.

Łódź

JD: vakas.

Lublin

FD (Instruado): vakas.

Nowy Sącz (woj. krakowskie) 35.000.

FD (Instruado): S-ro Aleksander Grela, instruisto, Sienkiewicza 37; tel. 506.

Nowy Targ (woj. Kraków)
D: vakas.

Oświęcim-Osiedle (woj Kraków)
D: vakas.

Pruszków (woj. Warszawa)

D: vakas.
FD (Fotografio): vakas.

Przemków (woj. Zielona Góra)
D: vakas.

FD (Instruado): vakas.

Przemyśl (Woj. Rzeszów)
D: vakas.

Radom (woj. Kielce)

VD: vakas.
FD (Filatelo): vakas.

Rzeszów

VD: vakas.
FD (Filatelo): vakas.

Warszawa

FD (Fervojaj aferoj): vakas.
FD (Vojoj): vakas.

Września (woj. poznańskie)
D: vakas.

Rumanujo

Bucuresti 1.348.900.

FD (Sporto: ŝako): S-ro L. R. Welther, inĝeniero, str. Lirei 11, bloc C, Bucuresti 34; tel. 51 83 99.
FD (Tekniko: mekaniko): la FD (Sporto: ŝako).

Sovetunio

Leningrad

FD (Pedagogia kaj scienca kinematografio): vakas.

Moskva

FD (Esperanto-instruado): vakas

Tallinn (Kalinini)

VD: vakas.

FD (Financ ekonomio): vakas.

FD (Literaturinterŝanĝado): vakas.

Vilnius (Litova SSR)

D: vakas.

FD (Kulturaj aferoj): vakas.

Svedujo**Göteborg 400.000.**FD (Filozofio): S-ro Herman Täh-
tinen, pensiulo, Timkatan 3, IV;
tel. 464407.**Norrköping**

D: vakas.

Ystad (Skåne)

JD: vakas.

FD (Ĵurnalismo): vakas.

Usono**Bethesda (Maryland) 30.000**FD (Medicino: psikiatrio): D-ro
E. J. Lieberman, 4915 Battery
Lane, Bethesda 14; tel. 6 54 53 58.**Bloomfield**

FD (Skoltismo): vakas.

Boston

FD (Medicino): vakas.

FD (Skoltismo): vakas.

El Cajon (Kalifornio)

D: vakas.

FD (Arto-muziko): vakas.

Iowa City (Iowa) 30.000.FD (Sporto: ŝako): Prof. L. A.
Ware, profesoro de elektrotekni-
ko, 1265 Melrose Ave., Iowa City,
Iowa, 52241; tel. 31 93 38 81 90.**Livingston (N.J.) 22.000**FD (Skoltismo): S-ro C. S. Otto,
farbovendisto, 7 Longview Road;
tel. 9 92 22 43.**Los Angeles (California)**JD: S-ro E. J. Baker, studento,
2215 Crenshaw Blvd., Los Angeles
16; tel. RE 2 56 47.**Pasadena (Cal.)**FD (Elektrotekniko): S-ro Ákos
Kovács, studento, 214 B Mosher-
Jorgensen House, California In-
stitute of Technology; tel. SY2-
9557.**Paterson (New Jersey) 150.000.**D: S-ro Allan E. Fineberg, poŝ-
tisto, 76 Seventeenth Avenue,
Paterson, N.J. 07513; tel. 742-
4298.**Portland (Oregon) 400.000**D: S-ro J. Deer, fizikisto, 12946
NE Hancock St., Portland, Ore-
gon, 97230; tel. AL 4 81 34.**San Carlos (Cal.)**

D: vakas.

Taylor

D: vakas.

FD (Abelbredado): vakas.

Walla Walla (Washington) 30.000D: S-ro A. Estling, leterportisto,
1351 Grant Street, Walla Walla,
Washington, 99362; tel. JA 5-2569.**Venezuelo****Maracay (Estado de Aragua)**

D: vakas.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJHigginbottom, F-ino E. M., Nel-
son, Britujo. Hoekstra, S-ro O,
Schoorl, Nederlando. Olesen, S-ro
Torkil, Århus, Danlando. Schmid-
heiny, F-ino F., Balgach, Svislando.
Sjöblom, Ing. Sven, Malmö, Sve-
dujo. Vaarst, S-ro Emil, Vejgaard
Aalborg, Danlando. Vokal, F-ino
Helga, Wien, Aŭstrujo. Waterbolk,
F-ino G., Groningen, Nederlando.
Willey, F-ino M. D., Dunedin,
Nov-Zelando.**MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1963**474. Challinger, S-ro J. K., Leeds,
Britujo; 475. Randrianasolo, S-ro
Gervais, Tananarive, Madagaskaro.**MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1964**1. Andresen, S-ro S., Fredericia;
2. Andresen, S-ino H. L., Fredericia,
Danlando; 3. Bily, S-ro H., Berlin,
4. Jaehn, S-ro W., Düsseldorf, 5.
Wagner, S-ro H., Fürth, Germanu-
jo; 6. Jonker, S-ino M. T., Broek
op Langendijk, Nederlando; 7. And-
jans, Riga, Sovetunio.**DONACO ĜENERALA KASO**S-ro W. H. King, Auckland, Nov-
Zelando 10.— gld.**POR VASTIGO DE LA AGADO**S-ro F. J. de Kinder, Montreal,
16,80 gld.

Entute: 13.935,07 gld.

Al ĉiuj donacintoj plej varman
dankon pro ilia granda helpo.M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

ANONCETOJ

*AVERTO - Nek la redakcio, nek
UEA iel ajn respondencas pri la
enhavo de la anoncetoj, aŭ pri
plenumado de promesoj faritaj en
ili. Tio aparte koncernas poŝtmark-
kolektantojn.*Se vi serĉas seriozajn gekorespon-
dantojn, ĉu individuajn, ĉu sur
kolektiva bazo (ekz. por lernejo)
turnu vin al la Koresponda Servo
de UEA (adreso: K.S.M., 12, Rue
des Jacobins, Clermont-Fd. (PdD)
Francujo) kiu peras adresojn laŭ
la regularo aperinta en Jarlibro
1963.**Ĉirkaŭ la naskiĝo de mia misio.** Tiu
libro estas raporto pri la okazaĵoj,
kiuj instigis Martinus verki, kaj ĝi
estas informo pri iliaj praktikaj
sekvoj. (55 paĝoj. Formato 13 × 19
cm. Fortika verda tolkovrilo kun
ora surpriso. Prezo 6,50 d.kr.). Petu
senpagan ilustritan faldprospekton
ĉe Martinus Instituto, Mariendals-
vej 94-96, Kopenhago F., Danlando.**Letero-vespero.** Okazos mez-febru-
are 1964. Skribu amase al Norwich
grupo. Adresu al Dean, 33 OrfordPlace, Norwich, Anglujo. Respondo
per bildkarto garantiata.**Letervespero** okazos la 15-an de
januaro en Pacifika Oceano. Adresu
il. pk. al: Esperanto-Rondo Honi-
ara, P.O. Box 136, Honiara/Guadal-
canal, Solomonaj Insuloj.**Nova Esperanto-grupo** en grava
industria regiono aranĝos la 20-an
de decembro 1963 letervesperon.
Sendu amase esperantaĵojn kaj
korespondproponojn. Antaŭdankon.
Adreso: Dipl. Ing. Janusz Zych,
Dom Górnik, Konin 2, Pollando,
kun la noto "por letervespero".**Nederlandanino**, nek juna, nek mal-
juna, deziras korespondi kun ge-
norvegoj. F-ino Tine Tusveld, Delis-
straat 18, Den Haag, Nederlando.**Mi deziras korespondi** kun la tuta
mondo pri ĉiuj temoj. Respondo
garantiata. Alcyr Guedes de Al-
meida, Poŝtkesto 21, São José dos
Campos, S.P., Brazilo.**Mi estas 45-jara vidvino**, junas-
pekta, simpatia kaj plaĉa. Mi estas
blonda kaj mezstatura. Nun, kiam
miaj du gefiloj jam edziĝis, mi estas
sola kaj libera; mi ŝatus kundi-
vidi mian vivon kun serioza amemasamideano ne pli ol 60-jara, juneca,
bonpozicia, memstara fraŭlo aŭ
vidvo. Por seriozaj edziĝproponoj
bonvolu skribi, aldonante foton al
jena adreso: Pasporto N 28278, Res-
tanta Poŝto, Sofio, Bulgarujo.**17-jara studento** deziras korespondi
pri botaniko (alĝoj, fiziologio de
floroj, dendrologio). Marcel Rej-
máněk, Obránců miru 687, Hradec
Králové, Ĉeĥoslovakujo.**Esperanto-parolata:** reeldonata Ad-
resaro. Mendu al S-ro Rétot, 149
Avenue Gambetta, Paris 20. 2.40 F
= 5 rpk = 7 steloj (poŝtĉekkonto:
Paris 1042-07).**Sociaj bazoj** de esperantismo: (1)
korespondado, tro ekskluziva; 2)
internacia kongreso, tro mallonga;
3) radio, nur en privata ĉambro;
4) vizitoj, nur post ellernado de
nacia lingvo; 5) Esperanto-Civito.
D. Soleo petas lokon en E-revuoj.
— 14 B Castle Avenue, Dover,
Britujo.**Geonkloj Esperantistaj.** Se vi estas
preta servi la infanojn de nia
movado, petu detalojn de admini-
stranto: 3, Berwick Avenue, Urm-
ston, Manchester, Anglujo.

FLUGU AL TOKIO!

Pri la internacia karavanvojaĝo aviadila al Tokio kaj revene en 1965, organizata de U.E.A., ni povas doni la jenajn pliajn detalojn, surbaze de kiuj oni povas sin anonci:

1) Forveturo el Amsterdam (aŭ eble el alia okcident-eŭropa urbo) la 27-an de julio 1965, alveno en Tokio la 28-an de julio 1965, ĉ. la 17-a horo (loka tempo). La Kongreso okazos de la 31-a de julio ĝis la 7-a de aŭgusto.

2) Forveturo el Tokio la 18-an de aŭgusto 1965 kaj reveno en Eŭropo la 19-an de aŭgusto 1965.

3) Prezo, inkluzive ĉiujn servojn, manĝojn kaj prizorgojn dum la veturoj, 2250,— ned. gld. (9000 steloj, £ 225.0.0). Povas esti, ke en 1965 tiu prezo iomete malpliigos. Ĉiukaze ĝi ne pliigos.

4) Aviadilo nederlanda, de tipo DC7C, tre komforta, plene fidinda, sub ĉiuj kutimaj kontroloj laŭ la internaciaj preskriboj.

5) Veturo laŭ la suda vojo, do ne trans la poluso.

6) Lasta dato por sinanonco estos la 1-a de marto 1964. Tiuj, kiuj ne havas ŝparkonton ĉe U.E.A. devas samtempe kun la aliĝo al la karavano pagi 500,— gld. Limdato por la finpago de la veturkostoj estos la 1-a de majo 1965.

7) Post plenigo de ĉiuj disponeblaj lokoj en la aviadilo, listo de atendantoj estos farata por la kazo ke iuj aliĝintoj devos ial rezigni.

8) Rajtas aliĝi al la karavano nur individuaj membroj de UEA.

Ni esperas ke surbaze de tiuj ĉi detaloj multaj decidiĝos pri definitiva partopreno en tiu ĉi unika vojaĝo, tiel ke ni povos ĉion konkretigi.

Dum la veturo la aviadilo haltos en kelkaj lokoj por preni benzinon. Ne estos eble, resti en tiuj lokoj por fari ekskursojn, ĉar tio tro altigus la kostojn. Ja krom la kostoj de tranoktadoj kaj ekskursoj aldoniĝus la kostoj de perditaj flughoroj de la atendanta aviadilo.

Ni tre rekomendas ke oni anoncu sin kiel eble plej baldaŭ, ĉar oni enskribiĝos laŭ sinsekvo de anoncado kaj — plena estos plena! Se pro neantaŭvideblaj kaŭzoj, ekz. malsaniĝo aŭ familiaj cirkonstancoj, aliĝinto devos rezigni pri la vojaĝo, ni ĉiel helpas por ke transprenu liajn sindevigojn alia persono.

La ebleco de dua aviadilo estos konsiderata, se montriĝos ke la nombro de aliĝantoj tion pravigas. Ĉiuj ĉi-supraj detaloj estas donitaj sub la rezervo, ke iuj eroj povos esti ankoraŭ ŝanĝitaj, se la cirkonstancoj tion postulos.

Volonte je via dispono por pliaj informoj,

M. H. Vermaas,

Direktorino de la Centra Oficejo

EN LA CENTRA OFICEJO DE U.E.A.

Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam Nederlando

estas loko por

**Lerta oficisto
por la libroservo**

kun bonaj scioj pri
librokomerco

**Akurata kaj sperta
Sekretari(in)o/Korespondant(in)o**

kun perfekta lingvoscio kaj
kapablo memstare labori

Proponu sin nur tiuj, kiuj jam pli frue laboris en la samaj fakoj. Bonaj referencoj bezonataj. Salajroj laŭ kapabloj. Leteroj kun detalaj informoj al la Direktorino de la C.O., F-ino M. H. Vermaas, je la supra adreso.

La Oratora Konkurso en Hago

La regularo de la Oratora Konkurso, kiun rajtas partopreni kongresanoj ĝis 28-jaraj, aperos en la Dua Bulteno. La temoj elekteblaj en 1964 estas:

1. Juna sciencisto antaŭ lingvaj baroj.
2. La rolo de Esperanto en la lerneja programo
3. La senco de lingvoinstruado en la lernejoj
4. Ĉu la latina kaj greka lingvoj necesas en lernejo kaj universitato?
5. Metodoj de informado en junularaj medioj.

Monda Kulturo kaj Belartaj Konkursoj 1964

Pro la eksiĝo de S-ro W. Auld la Estraro de UEA nomis D-ron A. Albault, 8 Avenue Et. Billières, Toulouse, Francujo, kiel redaktoron de Monda Kulturo, kaj S-ron E. P. Ockey, 15 Upper Pines, Woodmansterne, Banstead, Surrey, Anglujo, kiel sekretarion de la Belartaj Konkursoj.

La regulaj kontribuantoj al Monda Kulturo estas petataj sendi siajn kontribuojn al la nova redaktoro, kaj la aŭtoroj dezirantaj partopreni en la Belartaj Konkursoj siajn verkojn al la nova sekretario je la supraj adresoj.

ne forgesu

DECEMBRO

10

TAGON DE LA HOMAJ
RAJTOJ

distribuu

la Esperantan tekston de la
Universala Deklaracio de
Homaj Rajtoj

mendu

ĉe la Centra Oficejo, sendante
2 stelojn aŭ respondkuponon
por afranko de 50 ekzempleroj

Abonu ĉinan Esperantan periodaĵon:

EL POPOLA ĈINIO

Dumonata, en 40-paĝa kajero, 19 × 26 cm.

Premioj: ☆ Abonanto de 1964, paginta sian abonkotizon antaŭ la 1-a de feb. 1964, povos senpage ricevi belan Esperantan 1964-Kalendaron (17 × 24,5 cm., 24 p., kun 24 famaj ĉinstilaj pentraĵoj);

☆ Tiu, kiu varbis du novajn abonantojn por EPC, povos senpage ricevi pecon da multkolora silka bildo "Ĉielpaca Pordego de Pekino" (26.5 × 17.5 cm).

*Abonu ĉe Universala Esperanto-Asocio,
aŭ ĉe ĝiaj diverslandaj perantoj, aŭ rekte ĉe la Libroservo de ĈEL.*

☆

ABONTARIFO

<i>Landoj</i>	<i>Monoj</i>	<i>Por 1-jaro</i>	<i>Por 2-jaroj</i>	<i>Por 3-jaroj</i>
Eŭropaj, Nord-				
Amerikaj kaj	gld.	2.50	3.80	5.00
Aŭstraliaj	US \$	1.00	1.50	2.00
landoj	£	0-5-0	0-7-6	0-10-0
Aziaj kaj				
Afrikaj landoj	£	0-2-6	0-3-9	0- 5-0
Latin-Amerikaj				
landoj	US \$	0.50	0.75	1.00

☆

LIBROSERVO DE ĈINA ESPERANTO-LIGO

P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

(Pagita reklamo)



Lumo estas fonto de inspiro, por poetoj kiel por inĝenieroj. Nuntempe, lumo faras pli ol simple forpeli la nokton. Scienca esplorado estigis sennombrajn lampotipojn. Por alloge ornami hejmon kaj restoracion, por altgrada efikeco en uzino kaj oficejo, por sekureco sur noktaj ŝoseoj, la historio de la lumigado estas triumfo de teknologio. Philips estas mondgvidanta en lumigado jam de la komenco de ĉi tiu jarcento.

Stadio de Ibadan
Projekcia lumigado kaj
laŭtparola-instalaĵo
Ibadan - Nigerio



Aerodromo de Orly
Fluoreska lumigado
Parizo - Francujo



Parto de la aŭtoŝoseo del Valle
Kolare korektigita hidrarga
lumigado
Karakaso - Venezuelo



PHILIPS por produktoj kiuj daŭras!

